

Bô Yin Râ

HORTUS CONCLUSUS
(Ĉirkaŭfermita Ĝardeno)

Basle 1936
Copyright by Kober'sche Verlagsbuchhandlung

Interparolo je la pordo

Al la *tiuĉitera* homo, dependa de sia cerbe kondiĉita observado kaj de sia pensa konkludado, preskaŭ ĉio, kio estas „eterna“ en li – do ne *povas* subfali al ia ajn finiĝo aŭ dissolviĝo – vere restas „Hortus conclusus“: *ĉirkaŭfermita ĝardeno!*

La ekzisto de tia regiono, nealirebla al la fizikaj sensoj kaj al ĉia pensado, ja estas kelkfoje *suspektata*, kelkfoje *sentata*, kaj ene de grandaj homogrupoj *kredata*, sed la suspektanto, sentanto aŭ kredanto restas *ekstere* de la muro, kiu dislimas la fermitan al li ĝardenon de konscio pri la propra eterneco: la „perditan paradizon“, disde la kampoj de terecaj ebloj de ekono.

Unuopuloj, kiuj ankoraŭ ne estas kontentigitaj per ĉio, kion ili suspektas, sentas kaj kredas, senlace ĉirkaŭmigras kaj pripalpas la disigantan netransgrimpeblan muron, por eble trovi kaŝitan fendon, kiun oni povus plilarĝigi kaj tra kiu oni tiam povus preme traigi sin.

La plej fortunaj inter ili je sia propra surprizo vere atingas la solan kaj nur malfacile troveblan mallarĝan pordon, kiu povus formi la alirejon al la „ĉirkaŭfermita ĝardeno“, kondiĉe ke oni scius malfermi ĝin.

Sed anstataŭ pacience kaj fidante atendi, ke eble iam estu malfermate el interne, preskaŭ ĉiuj, kiuj havis la fortunon malkovri tiun pordon, penas akiri la plej strangajn falsajn ŝlosilojn ĉe ruzaj seruristoj, kaj disipas sian surteran vivotempon farante ĉiufoje sensukcesajn provojn rompe malfermi la seru-

ron de la „ĉirkaŭfermita ĝardeno“ *de ekstere*, kiu estas malfermebla nur *de interne*.

Vana penado kaj fatala memtrompo!

Nur iu, kiu mem estas konscia pri tio eterna kaj por kiu la ĝardeno, rigore fermita al ĉiu tera altrudemo, estas lia *hejmo* laŭ lia propra spirita naturo, kapablas malfermi *el de interne* la misteran pardonon, kiu, eĉ se ĝi estis tiumaniere malfermata, enlasas neniun, kiu ne *forĵetas de si ĉian ŝarĝon de rezultoj de pensa spekulativado* kaj *ĉian maskoveston*, per kiu li ĝis nun kovris sin, por eniri nuda, kiel li eliĝis el la ventro de sia patrino.

La laboro de mia tuta vivo konsistas en tio, ke mi ĉiam denove malfermas de interne la pardonon, elire de kiu mi kondukas ĉiujn, kiuj volas kunpreni kun si nenion alian ol tion, kio estas parto de ilia *eterna* vivo, al la instruaj temploj de mi konstruitaj kaj al la bildkolonoj de mi starigitaj kaj surskribitaj per vortoj de eterne valida instruo.

Ĉiu instruo donita de mi al miaj kunhomoj estas ĉirkaŭfermita de la muro de tiu ĉi „Hortus conclusus“, tiel ke mi plenrajte povas postlasi mian *kompletan* instruan verkon sub tiu nomo, kiu kunigas min mem kun ĝi, nomo, kiu pro bonaj kaŭzoj ŝajnas al mi adekvata kiel simbola titolo de tiu ĉi *fina libro*.

Ankaŭ ĉi tiu libro faras respondojn, kiujn mi en la paso de jardekoj donis private al *unuopuloj*, nun alireblaj al *multaj*. Same kiel la libro „Leteroj al unu kaj multaj“, ĝi celas malfermi al homoj alkondukitaj kaj fidantaj al miaj instruoj la okulojn por tio, ke la serio da libroj, kiu entenas tion, kion mi havas por doni el la eterno, devas esti rigardata kiel *tutaĵo*, kiu

baziĝas en la eterno kaj povas fariĝi alirebla nur tiam, se la kondiĉoj postulitaj de la eterno estas plenumataj.

Mi parolis sufiĉe ofte pri tiuj kondiĉoj, kaj denove karakterizis ilin en la ĉi antaŭaj linioj.

La lokoj en la interno de la ĝardeno, fermita por ĉiam al ĉiu scivolemo, al kiuj mi ankoraŭ intencas konduki la vokitojn per tiu ĉi libro, prezentas diversajn perspektivojn el ĝiaj sanktaj arbaretoj, de kie la konstrua dispozicio de la instruaj temploj starigitaj de mi fariĝas plej klare ekkonebla.

Ankaŭ kelkaj tabuloj kaj kolonoj kun gravurita enskribo, ankoraŭ ne malkovritaj en iliaj neintencitaj kaŝejoj, nun ne plu estos pretervidataj de atenta okulo.

Mi vere scias, kiom stranga la instruo prezentita en miaj skriboj devas aperi al la plej multaj el miaj kunhomoj, kaj mi komprenas tre bone, ke la hodiaŭa homo, sensperta en tio eterna, komence ne povas enpreni – per sia kapablo formi nociojn, al kiu li al kutimiĝis per edukado – ĝustasence tion, kion mi bedaŭrinde ankaŭ devas diri al li *pri mi mem*, se mi ne volas lasi lin stari antaŭ malplenaĵo, kiun li ne povas pleni el propra ekkono.

Mi ankaŭ scias pri la multaj formoj de psikologie maskita suspektigo, kiujn homoj de neresponeca senpripensemo tenas pretaj por ĉio, kio aperas al ili neklarigebla, por tiel kaŝi senpene sian propran nekapablon juĝi.

Pro la grandega nombro da spekulativaj konsideroj pri tio eterna, mi ankaŭ tute komprenas, ke oni ne povas opinii iun

el siaj kunhomoj kapabla maldorme sperti sin mem en tio nedubeble eterna, sen ia memtrompiĝo.

Krome, ĉiu ĝusta komprenado estas malfaciligata de multaj primitivaj *religiaj* imagoj, kiuj ne nur estis transprenataj de alte maturiĝintaj religioj, sed, strange, elire de teologiaj regionoj sukcesis firme teni sin, kun la tenaceco de trudherbo, eĉ en cerboj, kies posedantoj opinias sin alte superaj al ĉia dogmatismo.

Ne malpli grandaj estas la pensaj obstakloj, kiuj – kvazaŭ gigantaj volvoplantoj nutrataj de putraĵo en tropikaj praarbaroj – malebligas en la regiono de *filozofiaj* sistemoj ĉiun ekonadon de tio reale eterna.

En tiuj ĉi cirkonstancoj, nur koncize aluditaj ĉi tie, estas tre doloriga la tasko, por homo inter homoj, sciigi pri tio, ke oni – aparte de tre malmultaj kunhomoj, vivantaj en plej rigora kaŝiteco, de ekster-eŭropaj kulturrondoj – estas mem reprezentanto de tio eterna en la regiono de la tera homaro, kaj aldone: nerifuzeble destinita el tio eterna transmeti kiel unusola tradukanto en terhoman lingvon tion, kio fariĝas eslorebla nur en senvorta spertado. –

Oni vere devas esti lerninta priridi en si *ĉiun* formon de kaŝa aŭ malkaŝa terhoma deziro pri prestiĝo, se oni ne malesperu en sia limigita tera ekzistado pri la plenumbleco de tiu tasko!

Nur senlima amo al ĉio *eterne* aminda, kion oni vidas donita en ĉiu el siaj kunhomoj, kvankam la plej multaj apenaŭ konsciiĝas pri ĝi, estigas la forton ree kaj ree malfermi sin el tio eterna, malgraŭ tio, ke oni scias, ke al la plej multaj el siaj kunhomoj oni tamen restas „Hortus conclusus“.

Pri la simpleco en ĉio eterna

La mildeco de eterna spirita lumo ne estas perceptata de tro-ekscititaj nervoj. Nur en la antaŭe atingita neperturbebla serena kvieto de la animo povas malkaŝi sin la lumo de la dieco al tera sentado.

Mi vere povas paroli pri la maniero vivi kaj sperti en la eterna spirito kun plej interna spirita aŭtoritato, kaj tiel, kiel estas eble nur al iu mem spertanta.

Sed ĝuste pro tio mi devas konfesi, ke eĉ en la *plej alta* spirita vivo, kiu ja estas por mi *konscia*, kaptebla sperto, regas la sama sobre klara simpleco kaj memkomprenebleco, kiun konas ĉiu, kiu eĉ nur unu solan fojon en sia tera vivo konsciigis pri io eterna, indiferece en kia grado.

Tio, kion la plej multaj homoj *imagas* sub la vivo de l' eterna spirito kaj sub la homa spertado de tiu spirita vivo, estas tiom *terece* influita kaj tiom komplike *elpensita*, ke ĝi efikas la plej certan *eliminadon* de vera spertado de l' eterna spirito.

Sed kiu unufoje staris plej profunde skuita antaŭ la nedirebla *memkomprenebleco* kaj sobre klara *simpleco* de spirita vivado kaj spertado, tiu povas kompreni, kial mi avertas kontraŭ ĉiuj fantastaj imagoj, kiuj celas anticipe fiksi, kiel io spirita „devas“ prezenti sin al io tera.

Mi prezentis ĉion formitan de eterna substanco spirito, kio estas prezentebla, per vera bildo en vortoj, kaj ĉirkaŭis per silento nur *tiujn* regionojn de la strukturo de spirita vivo, kiuj ne estas alireblaj al iu komparo, kaj tial al iu prezentado en tera lingvo.

Sed ankaŭ la plej subluma mistero de tiuj regionoj estas protektita per sia nepriskribebla, terece neimagebla *simpleco*: – per tio sendemande „memkomprenebla“ de la okazado spertebla en ili.

Tie ekzistas nenio malkvietiga, ekscita, perpleksiga, timiga aŭ eĉ „horora“, sed anstataŭe mondoj de *absoluta spirita klareco*, kiuj ekskluzivas ĉion svagan, dubindan kaj necertan.

La samo aplikiĝas al *ĉiuj* regionoj de plene konscia, interna, substance spirita „eterna“ vivo, kaj sekve ankaŭ al la eterna animo de surterulo, en kiu vivas lumanto de la pralumo ene de la tera tempo difinita al li.

La lumanto de la pralumo estas unuigita al la eterna animo de la al li prezentita surterulo nur tial, ĉar sole per tiu unuiĝo estas eble alkonduki al ĉiuj *aliaj* eternaj animoj, kiuj tempe sin spertas kaj formas en teraj homoj, la „forton de supre“: la spirite generita eterna lumoenergio, kiun ili bezonas por atingi sian vekiiĝon en la eterna konscio.

Tio, kion mi *instruas* kiel lumanto de la pralumo, eble fariĝas por multaj la unua impulso por iom post iom, per propra kunsentado, prepari sin por la vekiiĝo de sia eterna animo, sed el la vidpunkto de la eterna substanco spirito mia nura *spirita „ekzisto“* ene de mia surtera vivo estas multe pli signifa ol mia tuta konscia „*agado*“. Aldone mi devas diri, ke la instruo vortigita kaj videble fariĝinta enprenebla vere prezentas nur

la *plej malgrandan* parton de tio, kion fari estas mia devo laŭ la eterna spirito.

Sed kio plej multe malfaciligas mian konscian agadon – kiel anime, tiel ankaŭ en la vortigo de mia instruado –, tio estas la neakordigebleco inter la pli kaj pli komplikiĝinta komplikeco de la cerba formado de imagoj kaj la terece nekaptebla simpleco de la eterna substanca-spirita vivo.

Tie ĉi, precipe en la *lingva* sfero devas esti superpontata abismo, trans kiu ponto estas konstruebla nur per la materialoj el la cerba mondo de imagoj kaj pensoj de plej komplikaj analizoj.

Ĉar ĉiuj vortoj de homa lingvo – indiferente kiu – estas netaŭgaj por servi kiel esprimo aŭ prezentaĵo de *tio prasimpla*, oni devas utiligi la plej komplikajn imagojn kaj bildajn nociojn, se oni volas proksimigi al la tera sentokapablo, ĉirkaŭvoje de la lingvo, sentojn, kiuj restus al ĝi nesperteblaj, se ĝi ne povus ekigi ilin en pense komplika maniero.

Sed se tiu konstruado de ponto vere *interligu* tion, kio ŝajnas esti apartigita por ĉiam, oni ne devas fari la malsaĝaĵon celi dissolvi la materialon el la regno de cerba komplikeco, kiu ebligu nur la superpaŝadon de la abismo, per filozofiaj kaj aliaj acidoj, ĉar ĝi teniĝas nur tiom longe, dum oni *ne* elmetas ĝin al pensa dissolvado.

Ponto ekzistas por tio, ke oni *transiru ĝin*, sed ne por dispecigi ĝin sub siaj piedoj!

Estante homo, kies hejmo estas la libera prasimpleco de la eterno, kaj kies psikofizika sentada organismo estas malligita de la stato de ligiteco normale surtere konforma al ĝi, mi vere

scias el propra malagrabla sperto, kion signifas por la animo de tia homo, ke li devas esti elmetita al la miloj da diversaj kvazaŭ „inferaj“ osciloj travibrantaj la vivospacon de la nuna okcidenta civilizacio, kiu preskaŭ sufokiĝas de sia progresanta komplikeco.

Sed ĉar estas neeble, efikigi eternan substancan spiritan vivon en ĝia nekonata simpleco ene de la vivospaco de tiu civilizacio *aliamaniere* ol per la surtera „*kunvivado*“ de lumanto de la pralumo, mi – kiel tiu naskita tiucele en tiu ĉi tempo – havas la kategorian *devon kun-vivi*.

Mi neniam povus plenumi tiun devon, se mi – nur unuigita kun miaj spiritaĵoj, naskitaj eterne egale al mi en la eterna spirito – volus teni min fore, aŭ eĉ daŭre apartigi min, de la regionoj de ekstera vivo, en kiuj estas enplektitaj miaj kunhomoj eŭropaj aŭ vivantaj laŭ eŭropa maniero en la cetera mondo.

Tamen mi devas krei al mi, ankaŭ *ene* de la regionoj de tiu ĉi komplika okcidenta civilizacio – cetere neniel tute kaj ĝenerale „kondamninda“ – *relativan* solecon, se fariĝu eble al mi spirite konformi al ĉio, kion mi devas plenumi en mia kunvivado por la bono de la kunvivantoj, ĉar tagon post tago miaj devoj postulas sufiĉe da horoj de senkondiĉe prezentita soleco.

Pri ŝanĝo de loko kaj pri „ŝtupoj“

En la spirita vivo ekzistas *neniu* ŝtupo, sur kiu oni devus malpermesi al si ree preni ekzakte la teniĝon, en kiu oni troviĝis, kiam oni komence levis la piedon por suriri la unuan, plej malsupran ŝtupon.

Oni rajtas ree kaj ree stariĝi libere kaj senembarase vidalvide al ĉio, kio renkontas onin kaj movas la animon, tiel, kvazaŭ oni ankoraŭ ne estus ricevinta ian instruon kaj kvazaŭ oni ankoraŭ ne estus spertinta eĉ la plejmalmulton en la spirito de la eterneco.

Povas esti eĉ tre progresige fari tian ŝanĝon de loko de tempo al tempo, eĉ se oni ne havas apartan kaŭzon por tio.

Kiel la pentristoj kutimas, post ĉiu nova perfektigo de sia verko, retropaŝi por gajni superrigardon de ĉiuj bildpartoj kaj tiumaniere juĝon pri tio ankoraŭ necesa, tiel ankaŭ la homo, kiu preparas sin por enpreni eternan spiritan lumon, de tempo al tempo distanciĝu de si mem, por ke li ekkonsciu tion, kio ankoraŭ mankas al la alstrebata enprenkapablo.

Krome, tio jam akirita *firmiĝas* en neatendita maniero rezulte de tiu libervola retropaŝado de si mem kaj de tio jam atingita.

Sed oni tre trompiĝus, se oni opinius, ke mi tie ĉi donas konsilojn, kies sekvadon homo povas facile rekomendi al aliu, estante mem ne plu koncernata de tiaj problemoj...

Kontraŭe, mi ne povas imagi al mi tagon, en kiu mia konscio ne reesplorus, deire de mia plej alta, plej interna eterna loko, ĉiujn interajn ŝtupojn ĝis la plej malsupra animala konscio de la pereonta tera korpo, kiun mi surtere forkonsumas.

El tiu profundo reatinginte tion mian eternan, mi kapablas *sentante* juĝi, kio en ĉiu unuopa kazo estas farenda el la eterna spirito.

Se mi volus teni min ĉiam nur en mia plej alta alto, mi ne *estus* tiu, kiu mi de eterne *estas* en la eterna „momento“, el kiu mi povis veni en tiun ĉi tempon nur per tio, ke mi surprennis la riskon eniri tion, kion „scias“ nur tiu, kiu konscie sper-tas en si ankaŭ la plej profundan profundon.

Tiel estas „mi“: la lumanto de la pralumo, – ankaŭ „mi“: unu rekonsciiĝinta en la eterna spirito el tiuj falintaj siakulpe en tion tempan, kaj laste – laŭ la tera ŝajno – ankoraŭ „mi“: la pereonta tera homo en la homa animalo. –

Sed la ŝtuparo el tio mia plej alta malsupren en tion mian plej malaltan ampleksas konsiderinde pli multajn ŝtupojn ol tiu ĉi konciza skizo supozigas.

Ne povas esti parolate pri tio pli detale, ĉar kompreno ne estus atingebla.

Nur tiu, kiu kiel lumanto de la pralumo estas kapabla, *mem* malsupreniri kaj reascendi tiun ŝtuparon, – kio neblas al la *tera* homo kiel tia, – scias pri la diferencaj specoj de ĝiaj ŝtupoj.

Krome, al ĉiu alia konscio tia scio havus neniun utilon.

Mi parolas pri ĉiuj ĉi aferoj por elradikigi unufoje por ĉiam la malsaĝan penson, ke povus esti „sub ies digno“ koncedi al si sentojn, kiuj memorigas onin pri komencaj mal-trankviloj.

Se estas neceso por mi, ĉiutage forlasi la plej altan lokon de mia eterna spirita konscio, por kunsentante sperti la animan staton de tiuj vivantaj en la plej profundaj profundoj de teraj inferoj, tiam ankaŭ ĉiu serĉanto povas esti sen zorgo, se li de tempo al tempo vidas sin kvazaŭ sur sia unua ŝtupo.

La beno el la eterna lumo rekondukus lin al lia nuntempe plej alta alto de konscio, pliriĉigita je multe da interna sperto, eĉ tiam, se li kelkfoje devus vidi sin abisme *sube* de la sente akiritaj ekkonoj de sia unua vojoŝtupo.

Tiu ĉi ŝtupara vojo ja ne konas „rangoŝtupojn“, de kie homo povus esti puŝata malsupren, sed nur ŝtupojn de *ekkonado* kaj *iluminiĝo*, kaj restas lasate tute sole al la serĉanto, ĉu kaj kiam li volas okaze reiri al pli frua ŝtupo de ekkono, por sur ĝi memore kaj tiam reascendante travivi denove tion jam ricevitan.

Tiu ĉi ŝtupara vojo estas vojo de „ekkonado per fariĝo“. Tial ĉiu ŝtupo surgrimpita estas *permanenta posedaĵo* ne nur dum la tuta tempo, sed ankaŭ en la eterneco, posedaĵo kiu konserviĝus eĉ tiam, se kaŭze de surtera kulpo ĝi devus fariĝi nealirebla al la konscio por la daŭro de eonoj.

Sed feliĉe nur malmultaj homoj inklinas al tiu nedireble lamentinda fatalo.

Pri diversaj konscionivejoj kaj pri helpo al suferantoj

Certe, neniam estas tre facile, libervole disigi sin de konscioenhavo, kiu ne estas priskribebla per teraj rimedoj – ĉar ĉiuj kliŝaj vortoj, ekzemple „absoluta harmonio“, „plej pura klareco“, „plej alta beateco“, ne povas eĉ iomete fidele speguli ĝin, – por malascendi tra malpli kaj malpli iluminitaj regionoj, ĝis oni ree povas percepti la obtuzecon de la nura homanimaleco.

Sed en ĉio ĉi samtempe kuŝas tia riĉeco de spertado por ankoraŭ terligita homo, kiu laŭnature ankoraŭ scias mezuri per teraj mezurbendoj, ke mi sentas kiel „gracon“ la devon, ĉiam denove trairi tiun ĉiutagan vojon.

Sur tiu ĉiutaga vojo en la mallumon kaj returne en la lumon, certe devas esti anime kunsuferata ĉiu *sufero*, kiu ekzistas en ĉiuj regionoj diversgrade malheligitaj.

Tio estus neeltenebla, se mi ne estintus anime edukita kaj instruita, – se mi ne samtempe vidus aganta en ĉiu sufero la „mensogon“ kaj ne scius, ke iam tute certe *alia* „*valoro*“ estos atribuata al la sufero.

Sed mi devas konfesi, ke tiu ĉi sufero, kiu iam kaj iam ne-mezeruble *transpasas* ĉion jam konatan, kelkfoje fariĝas konscie *kunsuferebla* en ĝia tuta terureco vere nur per uzado de *ĉiuj* animaj fortoj, kaj ke ĝiaj vibroj ofte turmente resonas en la *tera* konscio dum tagoj, kvankam ili estis „unumomente“ dissolvataj en la eterna spirita sfero.

Sed kion signifas mia tuta libervola kunsentado – kiel propra anima sufero – kompare kun la superabundo da sufero, kiu fakte estas senĉese portata *nelibervole* en ĉiuj konscioregionoj! –

Temus pri diabla indiferenteco al la nelibervola sentado de alia individua animo, se iu, kiu *scias* ke tie ĉi kunsupertado estas *necesa*, por ke mildigo estu farata, volus eviti tiun kunsupertadon, kaj vere ne estas „merito“, se tie ĉi oni ne estas gardema pri si mem.

Neniu konscioregiono malfermiĝas „de ekstere“! Oni devas mem voli portempe esti konscia en ĝi laŭ sia propra naturo, se oni povu doni helpon ene de ĝia regno.

Jam doninte tiom da klarigoj alialoke, mi apenaŭ bezonas aldone diri, ke tiu ĉi libervola ĉiutaga kunsupertado de plej diversaj konscioregionoj, ne apartenantaj al la normala propra koncionivelo, ne implicas „ŝanĝon de loko“, kaj ke ĉiu kunsupertado de la sufero trovebla en ĉiu konscioregiono estas *ĝenerala* enprenado de la sufero-„vibroj“ aktuale troviĝantaj en tiu regiono; kaj estas kunsentata tio, kion sentas *ĉiuj* suferantoj en tiu regiono, sed *sen iu malvolvado de personaj sortoj*, ene de kiuj la sufero estas sentata.

La helpo konsistas en la *elvokado* de la bezonataj spiritaj fortoj, kiuj tiam, sen plua interveno, ekaktivis en la koncerna konscioregiono tie, kie necesas: – laŭ la individua okazo kiel forto por *elteni* la suferon, kiel *mildigo* de la sufero, *liberigo* de sufero, aŭ en iu ajn alia formo bezonata.

Sed tiaj kunsupertado kaj efika helpado estas ebla nur per grandega konsumado de teraj vivoenergioj.

Ofte estas necese konsumi dum malmultaj *horoj* pli da vivoenergio, ol homoj starantaj en plej intense aktiva fizika aŭ cerbe kondiĉata vivo kapablas konsumi dum multaj *monatoj*.

Tio fordonita en eterna spirita aktiveco estas nerevenigeble forprenita for de la tera vivo.

Kompare kun *substancspirita* agado, oni sentas plej intensan *eksteran* aktivecon kvazaŭ kiel refortigantan ripozon, sed oni ne povas fari ambaŭ samtempe, kaj tio konsumita en pure *spirita* agado mankas en la surtera vivo por ĉiam kaj restas neanstataŭigebla.

Fortoj elfluantaj el la *eterna regiono*, kiuj povas esti transformataj en la teran vivon, tie ĉi ne kreskigas la surteran energion, sed kreas nur la eblecon de alie neebla *plia konsumo* de teraj energioj en la *eterna regiono*.—

La afero tute ne estas tia, ke io eterna ne bezonas tion teran! Nur kion la lumanto de la pralumo kapablas, dum sia surtera vivo, *rezervi* por sia agado en la eterna regiono, tion li povas uzi tie, kie li volas spirite helpi, kaj preventi eviteblan suferon, indiferente, per kiom da peno eble ŝargas lin lia surtera ekzisto, kiu laŭ sia naturo ja estas nur *vivo por aliuloj*; tie ĉi li havas neniun elekteblon kaj faras neniun demandon.

Pri la konscio de la forpasintoj

La ĉiam ripetata esplorado de rimarkinda serio de diversaj konscioniveletoj, kiu apartenas al la ĉiutagaj spiritaj devoj libervole prenitaj sur mi, kompreneble ankaŭ ampleksas la konscioregionojn de la homoj forpasintaj de tiu ĉi tero.

Ankaŭ tie ĉi ne ekzistas escepto rilate la neeblecon esplori specifajn individuajn sortojn.

Sed ankoraŭ ne longe pasinta estas la tempo, kiam mi epizode povis – en *alia*, nur *malfacile elportebla* maniero, kaj sub certaj raraj cirkonstancoj dependaj ne de mi *sola* – atingi mallongan kontakton ankaŭ kun *individue difinitaj* forpasintaj animoj ene de ilia konscioregiono.

Temis pri psikofizika sekvo – ne dezirata kaj neniufanke alstrebata – de certaj necesaj partoj de la iama, plurjara spiritokorpa instruado ricevita de mi, kaj mi multe suferis pro ĝi, ankaŭ korpe, ĉar la tuta situacio postulis eksterordinaran uzadon de fortoj, por plue kapabli majstri ĝin.

En kelkaj okazoj mi certe povis alporti aŭtentikan konsolon al homoj perdintaj iun por ili karan, sed la perado inter homoj vivantaj videble sur la tero kaj tiuj forlasintaj tiun videblecon estas planita nek en la *fizika kosmo* nek en la eterna *spirita* universo, kaj tia perado povus esti plej malmulte *mia* tasko.

Mi tial ĝojis, ke mi iun tagon ne plu bezonis defendi min kontraŭ ĝi, kaj tiam pli kaj pli klare rimarkis, ke tiu nedezirita stato de nevolita sentiveco perdiĝis.

Sed mi eĉ pli ĝojis, kiam mi estis sukcesinta definitive fini ĝin, kaj mi certe ne bedaŭras ĝian perdon.

Rilate al la ebloj de lumanto de la pralumo komuniki kun homaj animoj forpasintaj de la tero, bedaŭrinde ekzistas fantastaj imagoj eĉ inter homoj alie tre prudentaj kaj pretaj akcepti informojn kaj argumentojn.

Tie ĉi oni supozas „ĝuste“ nur, ke ni kapablas *senti* ene de la konscioregionoj de „mortintoj“.

Sed kion tio vere signifas, oni ne sufiĉe klarigas al si, – ĉar tio signifas: esti kapabla senti sin mem reale surtere „mortinta“, ene de la konsciosferoj de mortintoj. –

Sed anstataŭe, homoj alie tre juĝokapablaj senpense supozas, ke certe estas tre facile, „alvoki al si“, el inter nenombritaj milionoj da animoj, – kiuj estas enprofundiĝintaj en feliĉiga koncentriĝo sur sia spirita lumo kaj sentus ĉian „alvokon“ kiel plej amaran perturbon, – difinitan animon kaj ricevi de ĝi kvazaŭ specon de transmonda „intervjuo“.

Homoj, kiuj suferis malfacile elporteblan teran perdon per la forpaso de homoj nedisigeble ligitaj al ilia koro, povas fariĝi kapablaj por ĉia naiva ago. Tion montras, en kortuŝanta kaj timiga maniero, la enormaj nombroj da anoj de l' mediumismo, indifereinte ĉu ili ankoraŭ nomas sin „spiritistoj“ aŭ anstataŭigis tiun ĉi nomon, fariĝintan iom malbonfama, per nova nomo same erariga.

Oni vere *ne* plu devus renkonti, inter la legantoj de miaj instruskriboj, kiuj alkalkulas sin al la nombro de miaj disĉiploj, tian nesciadon rilate transejajn aferojn, sed ankaŭ en tiuj vere sufiĉe informitaj rondoj oni ankoraŭ trovas unuopulojn,

por kiuj ne bezonus ekzisti la „*libro pri la transa mondo*“, nek ĉio alia, kion mi sciigis pri la sama temo en tiom multaj aliaj lokoj de mia verkaro.

La solaj forpasintoj, kiujn oni povus „renkonti“ en la maniero, kiun la supre indikita naiveco imagas al si, estus la – vere „mizeraj“ – animoj, kiuj ankoraŭ agadas en siaj memkreitaj „bordoregnoj“.

Sed ili estas tiom ensorĉitaj de ilia kreitaĵo, ke ili *ne volas* sperti *ion* alian kaj tial *kapablas* sperti *nenion* alian ol tion, kion ili formas al si per sia propra kredo – kiu estas tio sola spertebla por ili, – kaj projekcias en sian „eksteron“.

Estas neeble al ni fari nin ekkoneblaj al ili, antaŭ ol ili konsumis la kredoenergiojn kunportitajn de sur la tero, kaj tio povas daŭri *tre* longe.

Homaj animoj, kiuj vivis en tera korpo jarmilojn antaŭ nia tempokalkulo, estas katenitaj en siaj „bordoregnoj“ ankoraŭ hodiaŭ.

Tie ne ekzistas „amasa vekiĝo“, sed la dissolviĝo de tiuj ĉi kolektivaj formaĵoj kreitaj per misgviditaj kredoenergioj okazas – eĉ en la plej favoraj kazoj – ĉiam nur sporade kaŭze de la vekiĝo de *unuopuloj* kaj *ree unuopuloj*.

Sed mi publike sciigis jam sufiĉon pri tiuj ĉi aferoj, tiel ke mi apenaŭ bezonas aldoni ion klarigan.

Kiel oni reale restas en rilato kun tiuj, kiuj surtere estis prenatalaj for de nia fizika perceptado, mi vere ankaŭ klare instruis, tiel ke mi bezonas nur referenci al tio jam donita.

Sed ni lumantoj de la pralumo povas helpi al la *atingeblaj* forpasintoj nur *instruante* kaj *iluminante*, en maniero *superpersona*.

Pri la alta risiko de helpanto

Dum lia malsuprenirado en pli malaltajn konscioregionojn, *ne* la „danĝeroj“ troviĝantaj en la *strukturo* de tiuj ĉi regionoj povas kaŭzi malfacilojn al la lumanto de la pralumo.

Antaŭ *tiuj* minacoj homo spirite konscia scias protekti sin, kie ajn li renkontas ilin.

Sed kio ree kaj ree inklinas premi lin per hororo, tuj kiam li malascendas en konscioregionojn, kiuj postulas portempan rezignon pri la konscioŝtupo konforma al li, tio estas la senindulga scio, ke sekve li portempe fordonas sian *spiritan potencon*, kaj dum tiu tempo restas sen defendo kontraŭ eventualaj „atakoj“ de detruaj fortoj el la nevidebla fizika mondo. Tiu scio inkludas la scion, ke subjektivaj neniigaj impulsoj konstante atendas la plej favoran momenton por ekigi tian atakon kontraŭ ĉiu lumanto de la pralumo, kiu fariĝas atingebla por ili en lia terhoma formo.

Homo sur plej malalta konscioŝtupo, sed kiu nuntempe estas *konforma al li*, restas *protektita* kontraŭ ĉiu provo de atako fare de pereigaj impulsoj el la nevidebla fizika mondo tiom longe, dum li scias teni siajn proprajn sentadon kaj voladon liberaj de samspecaj detruaj tendencoj.

Sed lumanto de la pralumo, kiu volas konscie eniri konscioregionon ne adekvatan al li, povas fari tion nur, se li portempe *malligas* sin mem el la spirita konscio apartenanta al li, kaj por certa daŭro, rezignante pri sia propra spirita formo, sentas pli malaltan formon kiel „sin mem“. Dume li necese devas teni sin mem *senarma*, kion bone scias tiuj nevideblu-

loj kaj iliaj videblaj helpuloj, al kiuj la surtera agado de ĉiu lumanto de la pralumo signifas plej grandan malutilon por ilia propra tempa ekzisto.

Tial ĉiu tiaspeca malascendo laŭŝajne signifas riskeme aŭdacan malsaĝon.

Kaj eĉ se oni – rigardante el surtera vidpunkto – komparas lian agadon kun tute ĉiutagaj danĝeroj, al kiuj oni elmetis sin milfoje, kaj al kiuj tagon post tago sennombraj homoj en la tuta mondo estas devigitaj elmeti sin survoje al sia laboro, – tute aparte de homoj, kies profesio per si mem estas plena de danĝeroj kaj antaŭneprigas ĉiam sentiman trankvilecon, – tamen restas diferenciga la eksterordinare granda *alto* de la risko, ĉar la danĝeroj de la ĉiutaga vivo en granda urbo aŭ en profesio minacata de multaj danĝeroj povas malsekurigi *la terkorpan vivon*, sed neniam la spiritan *konscion* surtere atingitan pri tio propra *eterna*.

Tie ĉi la lumanto de la pralumo riskas *perdi la konscion* de sia spirite konscia *tera homo*, kaj neniu antaŭe scias kun certeco, ĉu li sukcesos, ĝis la fino de sia surtera vivo, ree kaj ree regajni sian *terhoman* konscion, aŭ ĉu iun tagon tio lia terhoma ja *perdiĝos* al tio sia eterna, kaj do restos de li surtere nur frenezulo aŭ idiotiĝinta karikaturo de li mem.

Tio estas la *vera* danĝero, en kiu ĉiu alportinta eternan lumon en tiun ĉi surteran vivon, troviĝis ĝis sia tera forpaso.

Kion do povus signifi, kompare kun tiu danĝero, ĉia iam ebla fizika kaj anima *sufero!* – Ĝi estas „nenio“ kompare al tio, kio tie ĉi minacas ĝis la lasta spiro.

Rigardate el la vidpunktoj kaj de la eterna spirito kaj de la tera homo serĉanta sian tempe limigitan senton de kontenteco, certe ne ekzistas iu kaŭzo por eniri tian staton de danĝero,

se ĝi ne estas *absolute necesa* por doni nepran spiritan helpon, kiu sola ebligas al la eterna amo *reatingi* la terhoman konscion fariĝintan *nealirebla* al ĝi.

Mi apenaŭ bezonas aldoni, ke tiu danĝero *neniam* povas proksimiĝi al *aliaj* teraj homoj, indifere, kiun alton de ekonado ili kapablas konscie atingi, ĉar eĉ se ili volus, ili ne *povus* malligi sin el la konscioregiono atingita de ili por sperti sin mem en niveloj de konscio malproksimaj al la spirito.

Certe, *songoj* povas kaŭzi interplektiĝon kun la ŝpinaĵoj de unu el la sennombraj „bordoregnoj“, kies influojn spertas senĉese ankaŭ la dumtaga homa vivo de instinktoj, impulsoj kaj sentoj, se la unuopulo ne donas al si mem kategorie firmajn direktivojn rilate la nevideblajn influojn, kiujn li pretas akcepti, aŭ kiuj ne atingu lin.

Sed eĉ se tio songita estis tiom viva kiel la plej impresa dumtaga sperto, ĝi tamen *neniam* estis io alia ol *songo*, ĉar – feliĉe – nur la lumantoj de la pralumo *kapablas* konscie percepti la konscioakumulaĵojn, kiujn mi nomis „bordoregnoj“ de la transa mondo.

Tiu diferencigo sola sufiĉas por montri, kion oni pensu pri la homoj, kiuj kutimas vere aŭ laŭaserte prezenti „spertojn sur spirita nivelo“, sen nur suspekti, ke eĉ ne la menciitaj „bordoregnoj“ estas malfermitaj al ili *por maldorma spertado*, kvankam trancaj aŭ songaj statoj okaze permesas al ili duone maldorman konsciiĝon.

Sed mi nun krome volas korekti eraron, kiu fariĝis preskaŭ „komuna mensa propraĵo“, tiel ke mi ne miras, ekvidi ĝin en ĉia homa opinia pakaĵo.

Temas pri la erara opinio, ke en ĉiuj „transmondaj“ statoj *ĉiu* sentado, ekkonado kaj spertado devas esti komuna al *ĉiuj* animoj konsciaj sur la sama konscionivelo, tiel ke ekzistas neniu individua diferenco.

Sed tio estas nur unu el la multaj „elpensitaj“ ekkonoj, per kiuj la tera homo provas fari „transmondan“ ekziston komprenebla al si.

La realo aspektas alie kaj prezentas sennombrajn klarajn *diferencojn* inter la individuaj posedoj sur *ĉiu* „transmonda“ alto de konscio.

Sed ekzistas en la „transmonda“ maniero de spertado neniu ebleco de *trompa ŝajnigo* inter animoj, kiu surtere estas bazita en la animalhoma naturo, kaj neniu povas havigi al si „prestigan respekton“, kiu ne konformas al lia vera valoro.

Sed mi devas averti la leganton, ke li ne tro multe „*pensu*“ pri la posttera vivo. Tio, kion oni jam scias de mi pri tiu temo, abunde sufiĉas por difini la teran finiĝontan vivon tiu-maniere, ke ĝi devas disponigi sian vere ne malgrandajn fortojn de resonanco, por ebligi al la serĉanto ekkoni kun certeco la naturon de la „transmonda“ vivo jam tie ĉi kaj hodiaŭ.

Pri la karikaturado de la eterna „mi“

Dum kaj la mezepoka kaj la tiom pli maljuna orienta mistiko postulas, ke oni deturnu sin de la „mi“, eĉ ke oni interne *estingu* la „mion“, mi certe povas diri pri mi, ke ekzistis surtere apenaŭ iu „mistikulo“, kiu *povis* scii pri si kun tia certeco, ke tiu ĉi pasema „mi“ forbrulis en li ĝis la lasta fajrero, kiel mi tion nerenverseble scias pri mi, vidate el mia konscia eterna spirita vivo.

Se mi tamen diras en miaj instruaj tekstoj, ke la saĝulo estas elfunde kaj plene „mi“, kaj ke ĉio en li estas *submetita* al lia „mi“, devus do esti evidente, ke per la sama vorto mi celas *ion alian* ol la menciitaj „mistikuloj“.

Mi fakte parolas pri la *kontraŭon*: – pri la *praestaĵo* origininta el la eterna spirito, praestaĵo, kies distorditan, animalecan *trompan prezenton* tiuj majstroj de la mistiko celas.

Mi vere ne avertas kontraŭ la malestimadon de *tiu ĉi masko*, kiu sin nomas „mi“! Bedaŭrinde en la tuta mondo kaj en ĉiuj popoloj ĝi ĝuas tian estimon, ke preskaŭ neniu, kiu identigas ĝin kun si, ankoraŭ *rimarkas*, kiel per tio li nur *karikaturas* sian *veran* memon.

Ne estas mirige, ke nur tiom malmultaj homoj estas pretaj *rezigni* pri tiu trompa bildo, rezigno, kiu estas rigora antaŭkondiĉo por konsciiĝi en la spirita *pra-formo* „mi“!

Oni sin multe tro ŝatas en la memkreita *trompa bildo* de sia eterna „mi“, estas multe tro penetrata de sia fakte ekzistanta surtera prestiĝo, kaj de la reala aŭ laŭsupoza graveco de tiu trompa „mi“, ol ke oni *deziras* persvadi sin mem fordoni tion

konatan, ŝajne tiom certan, interŝanĝe kontraŭ io laŭsupoze tiom malcerta, kiel la propra eterna *pra-formo* „mi“. –

Neniu plu scias, ke tio, kion li kunligas en la nocio kaj vorto „mi“, estas nur io surtere *supozita*, kion li *kapabliĝas* supozi nur tial, ĉar la spirita pra-formitaĵo lin travivanta estas por li la nekonscia *modelo*, al kiu li kontraŭmetas en si la bildon de si mem plej konformantan al siaj teraj inklinoj, tiel sugestante al si mem sian trompan „mi“-nacion.

Infano kapabliĝinta unufoje esplori sian medion ankoraŭ ne scias, kio estas tio, se voĉo en lia medio diras „mi“. Ĝi ankoraŭ estas *por si mem* „medio“, en kiu, laŭ ĝia malgranda ĉiutaga sperto, ĉiuj aferoj estas ligitaj kun certaj son-serioj.

Ĝi do ankaŭ aŭdas certan songrupon ĉiam reage al sia propra eksterigo kaj lernas identigi kun si sian „nomon“ tute same kiel juna animalo vivanta proksime de homoj sukcesas fari tion.

Sed se la infano, – supera al ĉiuj animaloj per la eblo ekposedi diferencigitan lingvon, – volas indiki sin mem, ĝi nomas *la pecon de sia medio*, kiu ĝi estas por si mem, dirante la „nomon“ ree kaj ree aŭditan por ĝi. Nur multe pli malfrue ĝi lernas per mekanika ripetado: diri „mi“ kaj tiam ankaŭ iom post iom kompreni, ke tio ŝajne estas la „nomo“ komuna al *ĉiuj*, se ili parolas pri si mem.

Sed se la infano ekde nun diras „mi“ ankaŭ al si mem, la amplekso kaj profundeco de ĝia konscio-enhavo estas neniel ŝanĝitaj per tio, kvankam al la plenkreskuloj la uzado de la memnomo „mi“, tiom grava al ili, aperas al ili kiel grandega progreso de la malgranda estaĵo.

Por la adoleskanta kiel poste por la plenkreskinta homo, lia tuta vivosperto estas mozaika kunmetaĵo el multaj unuopaĵoj, kiuj unue formis lian „medion“, ĝis ili povis esti enmetataj en la memnomon „mi“, formitan jam en la infaneco. Kaj se inter tiuj multaj unuopaĵoj ankaŭ la kredo je la transmorta pluekzistado de la konscio apartenas al la propra „mi“-mozaiko, tiam al la memkonscio en la „mi“ nenio ŝajnas pli evidenta, ol ke ĉiuj ĝiaj akumulitaj enhavoĵoj devus havi „eternan“ daŭron.

Sed se tiam la homo konsciiĝas pri la abisma *naiveco* de tiu supozo, lia skuiteco estas tiom disŝira, ke la tuta cetera enhavo de la memkonscio bruske aŭ elegie sin malligas ne nur disde la iama kredo, sed ankaŭ disde ĉiu espero trovi por ĝi bazon malpli minacatan de danĝero.

Reviziado de la unuopaj mozaikŝtonetoj rilate ilian eble eternan daŭrecon, kaj rigora eliminado de tio certe pasema el la enhavo de la „mi“-konscio aperas ne nur kiel neplenumbla troa postulo, sed ankaŭ kiel senŝanca.

Oni ja perdis ankaŭ ĉian provilon, per kiu oni povus eltrovi, kio estas eterna kaj kio estas terece pasema, tiel ke oni opinias povi esti certa nur tiam, se oni faras neniun diferencon kaj alkalkulas *ĉion* al la nedaŭreco de la tera ekzistado.

Temas pri moka ludo, kiun ludas kaj kredantoj kaj homoj fariĝintaj nekredantoj kun la eterna „mi“, al kiu sola ili ŝuldas, ke ili estas ne nur animaloj, sed ankaŭ „homoj“: ĉar la „homo“ radikas *ne sur la tero*, sed *en la koro de la eterneco*, en tio Dia plej interna, kio en sia plej alta membildo estas „homo“ en si mem.

Sed por ke, anstataŭ la moka bildo, *la eterna „mi“ de la realo* penetru karnon kaj sangon en la tera homo, la eterno vere *ne* postulas, ke foriĝu el la konscio ĉio, kio ne estas de „eterna“ deveno. Sed oni ja distingu en la konscio senindulge, kio estas *eterna* kaj kio *tempa* enhavo.

Longtempe necesas senĉesa zorgemo, por ke ne morgaŭ neremarkite ree enkresku en la *plejinterno* de l' konscio: – en la „mi“, – tio, al kio estis *malpermesate* eniri kaj kio hieraŭ ŝajnis eliminata.

Simila situacio ekzistas, se oni volas transformi kampon superkreskitan de trudherboj en bonordan ĝardenon plenan de plej noblaj plantoj.

Unue la grundo devos esti ree kaj ree plugata, kaj rigore purigata per hakilo, ĝis ĝi estas tute *malplena* je ĉio, kio antaŭe elsuĉis ĝiajn fortojn.

Sed tiam, post kiam oni plantis la novajn kreskaĵojn, ankoraŭ longtempe necesos fervora gardemo, por ke ne rekresku tio, kio estis elradikigata, sed kion birdoj kaj vento ree kaj ree neremarkite dissemas.

Ĉio ĉi estas *ne pensa* farado, sed *sentolaboro* per la akra soko kaj la fortika fosilo el neeluzebla mistera ŝtalo, kiu povas esti forĝata nur en la ardo de la plej interna anima sentado ...

Anstataŭe, oni bedaŭrinde lasas plukreski en si la *ŝajnajn ekkonojn*, kun kiuj oni antaŭe familiariĝis. Tie ĉi kuŝas la kaŭzo por tio, ke multaj sentas en si de tempo al tempo la urĝon, krei al si – provizore – kunpensitan *surogaton* de la eterna realo, kiu estas atingebla nur *spertante*, surogato, kiu tiam malhelpas ilin konkrete senti la *realon*, al kiu ili ja volas antaŭeniĝi. –

Pliafoje pri vero kaj realo

„Vero“ kaj substancaspirita „realo“ *ne* estas la samo, kvankam ĉio *vera* baziĝas en tio *reala*.

Vero ĉiam estas *bildo* de la realo, sed – laŭ la postulo de la vorto – en ĉiuj cirkonstancoj klare „simila“ bildo, ĉe kiu povas tolere akceptataj nur tiaj „retuŝoj“ per grifelo kaj skrapilo, kiaj servas por *pliintensigi* kaj *pliklarigi* tiun „similecon“.

Sed dum tiu ĉi bildo ĉiam restas „bildo“ kaj neniam estas *la eterna substancaspirita realo mem*, tiu ĉi realo eterne restas la *kaŭzo* de ĉiu ekkono de la vero.

Tie ĉi mi tute ne faras ludo per vortoj!

La du nocioj signas konkretaĵojn, kiuj devas esti distingataj plej ekzakte. En la libro „La vojo al Dio“ multo apartenanta al tiu ĉi temo estas jam dirita.

Kiam mi parolas pri eterna spiritsubstanca „realo“, mi celas tion surtere *nepercepteblan* per teraj sensoj, en si mem *vivan* kaj ĉiutempe „*eternan*“, kion Jesuo nomas „la regno de la ĉieloj“: – la en si ĉian daŭron ampleksanta regno de la substanca spirito, kiu estas la sola neelĉerpebla abundo de ĉiuj fortoj – nenio, kio havas ian rilaton al la „pensado“, nenio „elpensita“, – sed „spaco“ generita de la eterneco.

Malmulto baras la vojon al la interna trovado de tiu ĉi *eterna* realo en pli malhelpa kaj pli malica maniero, ol la horore fatala uzo de la vorto „spirito“, kiam oni celas paroli pri iuj eksterigoj de la homa *cerbo*: pri pensoj kaj ilia kunligado, pri „pensada vivo“ kaj pensa laboro.

Se oni kutimas nomi „spirito“ la fumon el pensoj suprenkirlitan per la aktiveco de la tera, fizika cerbo, tiam estas vere malfacile fari sian konscion preta por enpreni la „kreatan spiriton“ de la eterneco, kiu *estas* la „eterna vivo“ suverena el si mem kaj ampleksas en sia substanco esto ĉion, kio prezentas tion generitan en ĝia regno, sed ne enlasas en sin ion, kio ne eliris el ĝi en la eterneco.

Nur pro tio, ke la tera homo, *en sia fiziksense neperceptebla kerno*, estas de eterne la „generitaĵo“ de spirita generado, li, kiu lasis sin fali el la eterna „momento“ en la trompan ŝajnan daŭron de la kosma „tempo“, povas iam reeniri en sian regnon, kunportante el sia tera konscio tion, kion li volas kunporti, kondiĉe ke ĝi ne kontraŭas la immanentan ordon de tiu regno.

Kompare kun la eterna „realo“, ĝia bildo: la „vero“, estas „*stampaĵo*“ surtere formita, sigelo de la eterneco stampita en tera sigelvakso.

Sed la homo, kiu *ne* portas en si la sigelon de la spirito, ne povas sciigi pri la vero el la eterna realo, eĉ se li *volas* fari tion per ĉiuj siaj teraj fortoj, kaj per ĉiuj fortoj de sia eterna animo. –

Ĉar temas tie ĉi ne pri la simpla homa „volo diri la veron“, sed pri la atestado de la propra *stampiteco* per la eterna realo, kaj nur tiu, kiu *tiel portas en si* la veron el la eterna realo, povas *doni konigon* el la vero, ĉar *lia propra konscio* fariĝis lumanta, kaj estas viva, en la vero enstampita en li.

Pri tempa kaj eterna spacoj

Ĉiuj bone informitaj homoj scias, ke en la science praktikata geometrio oni kalkulas, tre serioze kaj tute ne ligite al okultismaj dogmoj, kun la ebleco de *kvardimensia* spaco; kaj ke oni eĉ ne rigardas *multdimensiajn* spacojn kiel ion neebla.

Neniu devos kulpigi sin pro nerespondeca fantaziado, se li supozas, ke estas certigite, ke al tiuj ĉi kalkuloj konformas certaj faktaj pruvoj troveblaj en la kosma spaco, ekzemple al astronomiaj kalkuloj pri astroj restantaj nevideblaj al la plej grandaj teleskopoj, sed kies ekzisto tamen estis nerefuteble pruvata per observado de ilia ĉirkaŭo.

Sed la geometrie kalkuleblaj spacoj kvazaŭ kaŝiĝas *en* la *tridimensia* spaco spertebla al ni, eĉ se ni kiel tridimensiaj estaĵoj normale ne povas percepti la kvar- ĝis „n“-dimensiajn spacoformaĵojn kaj spacoestaĵojn.

Tiu ĉi neebleco sense percepti ilin nepre ne devas forlogi nin al la supozo, ke tiuj *pli-* ol *tridimensiaj* spacoj, enkondukitaj en la imagon per geometriaj pensformoj, estas io alia ol tio neperceptebla al ni de la *fizika* mondo.

Ĉiuj tiuj geometrie eltroveblaj spacoj havas *absolute nenian rilaton* al tio, kion mi nomas la *eterna* „spaco“ en la eterna spirito.

Tio eterna – *neatingebla* al ĉio kalkulebla, al ĉio trovebla per pensmetodoj – ja estas *en la sama loko* kiel la fizika mondo, sed *tute neimagebla laŭ bildo de terece kalkuleblaj spacoimagoj*.

Sed la geometrio, kun sia pensa konkludado de multdimensia spaco, estas tre proksima al komprenado de certaj bone observitaj „metapsikaj“ fenomenoj, kiuj hodiaŭ estas apenaŭ plu kontestebaj eĉ fare de la plej obstinaj ignorantoj. Se oni sukcesus en tio, oni ankaŭ povus montri, ke la ridinde stulta, teda karaktero de tiom multaj „spiritismaj“ manifestiĝoj de la lemuraj estaĵoj en la parto de la *fizika* mondo *nevidebla* al okulo perceptanta laŭ tridimensia maniero, estas neeskapeble necesa fenomeno, kiu rezultas el la *fremdeco* de la lemuraj „maskoj“ en la *tridimensia* spaco, en kiu ili okaze agas.

La tuta universo „entenas“ multajn spacomondojn, kiuj normale estas neperceptebaj unu al la alia, se ne speco de „difekto de izoliteco“ kreas dumtempajn kontaktojn, kiuj rezultigas la interpenetradon de diversdimensiaj „materioj“.

Nur la absoluta „nenio“, – kiu, estante *tre reala* afero, ĉirkaŭlimigas tiun ĉi tutan universon en eterna rigideco, kiel io terece neimageble „malmola“, – estas *sen* spaco kaj *ekster* ĉia ebla spaco: absolute sendistanca, *ne kaptebla* per la cerbo, eĉ ne bilde.

Sed *eterna* „spaco“ penetras *ĉiujn* diversdimensiajn mondojn, *sen* esti perceptebla al la estaĵoj, kiuj spertas sin *sole* en ili, per la perceptokapablo kondiĉita de la spaco, en kiu ili vivas.

Neniam teraj homoj povus sperti ĝin, se ili ne estus spirite kaj substance *identaj* kun ĝi en sia *eterna* vivokerno!

Tiu ĉi situacio tute ne estas influata per la nekapableco de la plej multaj, *ekkoni* sin dum sia surtera vivo en tiu ĉi plej

interna kerno, kaj tiu nekapableco estas ne io neeskapebla, sed nur fatala sekvo de anima inerteco.

Sed tio ne estas ŝanĝebla per la „intelekto“!

La intelekto bezonas materialon, per kiu ĝi povas labori, kaj ĝi kaptas ĉiun materialon, kion oni prezentas al ĝi, ekprialaboras ĝin kaj fine faras el ĝi tion, kion ĝi povas fari el ĝi, depende de la disvolviĝo de siaj propraj fortoj kaj laŭorda trejnado.

Sed por trovi en si la plej internan eternan kernon: – la vivantan substancan fajron de la spirito, kiu kapablas porti la homan konscion en tion eternan kaj konservi ĝin tie, – estas bezonataj *aliaj* fortoj, kiuj, same kiel la intelekto, devas esti *ekzercataj* kaj *trejnataj*, se ili faru, ankoraŭ dum oni disponas ilin dum la surtera vivo, tion kio estas ebla al ili.

Pri aziaj religiaj tekstoj

Mia kono pri aziaj religioj certe ne originas el libroj. Libroj ĉiam povis alporti al mi nur cerbajn reenkontiĝojn kun tio jam de longe spirite konata al mi.

Sed mi scias, ke unuopaj eŭropanoj, kiuj ricevis sian scion el libroj, havas la inklinon bonvenigi antikvajn orientajn religiajn dokumentojn kaj preĝolibrojn kvazaŭ kiel psikologiajn revelaĵojn, kaj servigi ilin al si kiel atestilojn por propraj hipotezoj.

Mi ankaŭ scias, kiom da trotaksado okazas en tiu ĉi rilato, kaj ke krome temas tie ĉi pleje pri „distordaj prezentoj“ de erare aŭ duone komprenitaj religiaj spekulativaj pensoj kaj imagoj el apenaŭ kontrolebla antikva tempo, al kiuj oni direktas tiun estimon.

Krome, ne estas kompreneble, kial temas pri pli da saĝo, se en azia mistika teksto estas dirita la samo kiel tio, kion en la eŭropa kulturrondo formulis Eckhart, Tauler, kaj anonima Frankfurta mistikulo, aŭ ekzemple tio, kion *Angelus Silesius* celis per la konataj versoj:

„La ĉielo estas *en vi* – ankaŭ infera turmento: – kion vi elektas kaj volas – ĉiam vi tion havos!“...

Sed certe estas nedubeble, ke la sama vero kelkfoje malkaŝiĝas *el tute novaj perspektivoj*, kiam subite prezentiĝas formo, kiun ĝi ricevis en fore malproksima kulturrondo.

Precipe en tio ĉi konsistas la praktika signifo de la tekstoj el la religia mondo de Interna Azio, kiuj nun fariĝas alireblaj al la eŭropanoj.

Ne la *dogmoj* de orientaj religiosistemoj – dogmoj kies tendencoj estas jam de longe konataj – prezentas la plej gravan valoron, kiun tradukado povas peri, sed la diversaj alispecaj *formoj* de kelkaj ekkonoj de speco tute nedogma, kiuj ne mankas ankaŭ en la *eŭropa* antikva religia kulturo.

Sed tiuj formoj povas konduki al tre signifaj stimuloj, kaj vere doni gravecon al la nove malfermita antikva orienta religia tekstaro.

En la aziaj religiosistemoj kreskintaj sur la tero de Hindujo aŭ influitaj el Hindujo, oni alstrebas la atingon de tio eterna per speco de anima interna dramo, en kiu la homo estas samtempe aktoro kaj spektanto, *prezentante* siajn diojn *en si mem* kaj sentante ilin laŭ sia naturo kun la tuta forto de la propra memcerteco kiel vivantaj kaj rilatantaj al si, iufoje atingante eĉ *plenan subjektivan identiĝon* (oni pensu ekz-e pri Râmakrishna). Aliaflanke, jam ekde antikva tempo la eŭropa homo sekvis manieron de religia strebado ekzakte *kontraŭan*, baziĝantan sur *lia* naturo, celante sperti en tio dia *sin mem*: – la „homon“. Tre rimarkinde estas, ke tio ĉi aplikigas ankaŭ al la *islamo*, kiu al ni eŭropanoj ŝajnas tiom „orienteca“.

Sed precipe la kristana religio, en ĉiuj siaj formoj, estas – kie ĝi estas spertata konsekvence – tia religia spertado de la praorigina „ *homo*“ vualita de *dieco* en la dieco. Vere: tio estas „antropomorfismo“, kiun karno kaj sango *sole el si mem* ne povis sugesti al la tera homo!

Oni povas atingi la spertadon de tio eterna kaj en la *azia*, kaj en la *eŭropea* maniero, sed en ambaŭ specoj tiu plej alta spertado ebla al la tera homo dum lia korpa vivodaŭro restas rezervita al tiuj, kiuj kapablas sukcese trabori sin tra la dornoplena sovaĝroza superkreskaĵo, kiun formas la dogmaro kultivita plu kaj plu dum jarcentoj, ĝis ili atingas la plej internan veroenhavon: – la klaran ekkonon de tio, kion la dogmoformantoj origine volis *protekti*, sed, kun la plej bona intenco, ĝuste per tio elmetis al plena superkreskado.

Tamen – aparte de unuopaj, sufiĉe diferencaj esceptoj –, sobre rigardante sian apartan naturon, la *aziano* prefere tenos sin je la *azia*, sed la *eŭropano* je la *eŭropa* maniero, kie ajn tera homo volas atingi veran spertadon de la eterno, ĉar tiuj du fundamente malsamaj manieroj baziĝas sur *psikofizikaj* diferencoj kaj tute ne prezentas arbitre originintajn „metodojn“.

Oni povas nek *kombini* la du manierojn, nek *pasi* de unu maniero al la alia, se la celo, finfine komuna al ambaŭ manieroj, estu reale atingata.

Certe neniu leganto eĉ nur unu momenton dubos pri tio, ke mi instruas la *eŭropan* manieron atingi la spertadon de la eterneco. Sed ĝi estas *pliriĉigita* per ĉio el la *orienta* sperto, kio povas esti „miksita“ kun la *eŭropa* maniero.

Tio certe ne „kontraŭdiras“ la ĵus menciitan neeblecon kombini la du manierojn aŭ praktiki jen la unuan, jen la alian, kaj estus same eble doni al instruo de la *azia* maniero pli fruktodonan formon per tio, ke oni pliriĉigas ĝin per *eŭropa* spertaro.

Kvankam oni ankaŭ kiel eŭropano spertas, ke en la aziaj tekstoj kelkfoje „tio aŭtentika estas renkontata tre dise“ kaj estas profunde „kaŝita“, dum „io negativa ĉie kuŝas terure ri-

gide je la surfaco“, oni tute ne devas inferenci je la valoroj, kiuj al eŭropano restas *nealireblaj*.

Ankaŭ al aziano, kiu volus esplori la hodiaŭajn spurojn de vera spertado de l' eterneco *en Eŭropo*, probable okazus la samo pri eŭropaj religiaj tekstoj.

Sed estas ofte sentata kiel „demona“ la praktika *okultismo*, kiu montriĝas en ĉiuj aziaj religioj, kaj kiu originas el la respektiva lando kaj estas kvazaŭ hereda, sed kiu por la homo de l' Oriento prezentas kvazaŭ regionon de la *fiziko* kaj ne estas sentata de tiuj bone konantaj ĝin kiel „sinistre timiga“ en nia senco.

Laŭ la grado, en kiu tiu ĉi okultisma praktiko ankoraŭ moviĝas sur vojoj difinitaj de la religio, ĝi ankaŭ estas ankoraŭ bridata de la religio, kaj tiam estas rigardata kiel sendanĝera eĉ de homoj spirite alte supera al tiu praktiko. Nur tie, kie la okultismo *mem* fariĝas „religio“ en Azio, oni rajtas nomi ĝin „demona“ en minaca senco.

Oni proksimiĝu al la religiaj tekstoj de la Oriento *senantaŭjuĝe* kaj pli rezolute apartigu la bonon disde la malbono, tiom pli ĉar tio plej bona, plej valora kaj plej mistera, kion Azio gardas, *neniam* fariĝis objekto de notado, kaj ĉar la malmultaj manskribaĵoj, el kiuj ĝi *povus esti konkludata*, tute certe neniam falos en la manojn de neaziano.

Pri la mistero de l' Oriento

Kie lumo heligas mallumon, tie oni sentos ankaŭ *varmon* en la ĉirkaŭo de la lumo. Sed nur en la *spaca proksimeco* de la lumo, kaj ne ĉie, kien ĝiaj radioj alportas *helon*.

Tiel ankaŭ rezultas el la ekzisto de la spirita-substanca „templo de la eterneco“, fiksita en difinita loko sur tiu ĉi tero, kaj el la spirita-anima okazado plenumita en tiu ĝia loko ekde antaŭ jarmiloj, ke de tiu lumfonto elradiis tute neintencita, sed laŭnature ankaŭ neevitebla spirita influo sur la geografiajn ĉirkaŭojn, kaj devas seninterrompe plue elradii.

Ĉar la menciita loko situas meze de la plej altaj montoj de la tero kaj tiuj montoj tektonike formas la tre vastan „geografian centran regionon“ de Azio, ne estas mirige, se, el la terkorpe nealirebla loko de plej intensa spirita okazado en la vivoregiono de tiu ĉi planedo, la osciloj en la kompakta konsistenco de spirita substanco, kiuj tie estas estigataj, ankoraŭ propagiĝas tra sufiĉe vastaj rondoj de tiu kontinento, ĝis ili iom post iom perdas sian forton.

Al tiuj potencaj kaj relative vaste aktivantaj rondoj de spirita-substanca radiado la popoloj de interna, orienta kaj suda azio ŝuldas sian inklinon al la anima preteco enpreni ion supersensecan en la animan konscion, kaj ne malmultan suspektadon de la realo, suspektadon, kiun oni vane serĉus alialoke.

Sed oni certe ne devas konkludi el tiu fakto, ke sekve ĉiu aziano vojaĝanta en Okcidento estas tute senprezare malfermita al religiaj sekretoj aŭ eĉ posedas altajn spiritajn ekonojn.

En ĉiuj regionoj de Azio, same kiel en Eŭropo kaj la aliaj kontinentoj, ekzistas turmentiĝantaj skeptikuloj, frivolaj mokantoj, varmetaj duonkredantoj, kaj antaŭ ĉio: armeo da anoj de superstiĉo; sed oni ne rajtas diri, ke superstiĉo kreskegas *nur en Azio* kiel bambuo en ĝangalo.

Sed kiel ĉie en la mondo, tiel ankaŭ en Azio ekzistas profundanimaj naturoj, kiuj malgraŭ ĉio ĉi ne povas trovi sian sufiĉon, sentante en si la dezirogon forigi en si la izolajlon, kiu apartigas ilin disde la konscia perceptado de ilia propra kaŭzo de ekzisto kaj vivo.

Ke dum jarmiloj tiaj homoj kapablis ricevi la substancia-spiritajn vibrojn, kiuj elradiis el tersurfaca punkto space relative proksima al ili, prezentante akompanan fenomenon de la iluminaj kaj helpaj spiritaj mesaĝoj elsenditaj de tie al la tuta mondo, tio estigis la atmosferon, kiu jesas ĉion spiritan – sed ankaŭ sennombrajn pseŭdospiritajn fenomenojn –, atmosfero, kiu aperas al la neaziano, kiu same serĉas tion eternan en ĉiu fenomeno, tiom mistera kaj nekaptebla.

Tiu ĉi atmosfero antaŭe tiris ankaŭ la *islam*on, origine malproksiman al ĝi, en sian sferon, laŭ tio, kiom tiu religio venis en ĝian geografie difineblan spiritan zonon. En nia tempo tiu atmosfero perdis multegon de sia lumiganta, varmiganta forto. Ne pro tio, ke la radioj eble malpliigis, sed ĉar *eksteraziaj* influoj portas sian disigan efikon eĉ en la rondojn de plej altaj aziaj religiuloj, tiel malpliigante la nombron de tiuj, kiuj

kapablas konservi en si la neskeblan trankvilon, kiu estas kondiĉo por la *sentado* de la substanco spirita radiado el la loko de la spirita templo de la eterneco sur la tero.

Sed ankoraŭ nuntempe, la apero de tiom multaj imagoj konformaj al la spirita realo, kiujn oni vane serĉus en aliaj kontinentoj, estas atribuebla al la spaca proksimeco de la loko de ege ampleksa revelaciado de eterna spirita potenco, kies influo efikas en la animoj de la homoj kapablaj ricevi ilin.

Malutilas fakte nur iomete, ke tiuj efikoj okazas pleje en animĝardenoj de multkolora floranta superstiĉo, ĉar tiunmaniere la superstiĉo fariĝas pozitiva portanto de tera bildo de la eterna realo.

Sed tre erarus ĉiu neaziano, kiu imagus, ke li bezonas nur uzi la venontan okazon enŝipiĝi kaj tiam, deloke de hinda haveno, veturi al Simla aŭ Darjeeling por tie ricevi riĉan abundon de la menciitaj radioj.

Aparte de tio, ke ankaŭ sur Cejlono, sur la Malaja Insularo, en Ĉinio kaj Japanio li ankoraŭ tute ne estus ekster la influo de tiu radiado, li povus en ĉiuj ĉi lokoj nevole meti sin en plej belan memsugeston, sed povus neniam fariĝi sentebla al li tio, kion eĉ aziano preparita en sia sango dum sennombraj generacioj devas *lerni* senti en lernotempo al okcidentuloj neimageble malmola, kiu daŭras multajn jarojn kaj en kiu ĉiu memtrompo devas esti senkompate elradikigata. – Nur tre malmultaj orientuloj vere trapasis ĝin!

Tiom facila, kiom la neaziano imagas al si la malfermon de kaŝaj sentoorganoj, post kiam li apenaŭ mem aŭdis pri la *ebleco* de tiu memdisvolviĝo, ĝi certe ne estas.

Nur iu, kiu havas neniun alireblon al la speco de preparado tie ĉi necesa, povas ekhavi la ideon, ke perceptokapablo, por kies akiro sennombraj vivoj estas vivataj en Oriento, – por kiu ĉiu penego estas elportata kaj ĉiu el la kelkfoje surmetataj memsuferigoj estas fiere kaj kuraĝe eltenata, – povus preskaŭ senpene ankaŭ atingata de nepreparita homo per simpla sentada agordado de la preteco enpreni. –

Pri la senmezura aroganteco, kiu serioze supozas, ke orientulo nenecese malfaciligas al si tiujn ĉi aferojn, ĉar li scias nenion pri la ekkonoj de la okcidenta moderna psikologio, tie ĉi ne plue estu parolate.

Tiu senscia aroganteco eĉ staras profunde sube de la vulgara okultismo, kiu provas kredigi al siaj anoj, ke ili povas atingi tion, kion orienta religiulo gajnas kaj por kio li kuraĝe riskas sian tutan vivon, per serio da kredaj asertoj ĉiutage ripetataj kaj kontraŭdirantaj ĉian realon.

Vere: – estas malfacile esti homo el la plej antikvaj kultur-regionoj de la mondo, kaj tamen ne rideti pri la fantazia superstiĉo, ĉiuflanken etendebla, de la okcidenta civilizacio!

Pri la diversaj formoj de religio

La *homo* sur la tero estas *antaŭkondiĉo* por la estiĝo kaj ekzisto de la teraj religioj, sed tiuj ĉi tute ne estas kondiĉo por la surtera ekzisto de l' homo!

Tiu ĉi frazo ne nur sekvas el la konata evangelia vorto pri la juda Sabato, sed estas ankaŭ, tute nedepende de tiu vorto, memkompreneblaĵo dubebla de neniu prudenta homo.

Kaj tamen ekzistas multo da religiaj fervoruloj, kiuj plej volonte inversigus tiun memkompreneblan frazon.

Ili estas troveblaj en ĉiuj religioj, kvankam ne ĉie tiom grandnombre kiel ĝuste en tiuj religiaj rondoj, kiuj sin apogas sur la instruo de la sublima homo, kiu tiom klare karakterizis la Sabaton, kaj do ĉiun religian konvencion kaj statuton, kiel pure *homan* aferon: „por la homo“.

Sed ĉie, kie la anoj de religioformo forgesas la neskeblan veron de tiu frazo, leviĝas minace por la koncerna religioformo la danĝero perdi tion, kio en ĝi estas „religio“, kaj rigidiĝi en nuran eksteran *formon*, kiu tiam strebas nur al tio, ke ĝi konservu sin pro si mem en sterila ekzisto, favore al siaj servantoj, sed je la kosto de ties anaro.

Anstataŭ esti protektujo de la religio pro la bono, kaj en la servo, de l' homo, la formo *malpleniĝas*, kaj ĝia malpleneco kvazaŭ vakuo senkompatate ensuĉas la homon, kiu ja devis esti ĝia *mastro* per la enhavo kreita de li. –

Oni sur la tero vere ne devas *serĉi*, kie tio okazas, ĉar tio okazas *ĉiuloke* en la nuna tempo!

Sed ĉiu religioformo, kiu ne volas fariĝi malplena formo, devas atenti, ke ĝi ne fariĝu „*tolerema*“, ĉar ĝi *ekzistas* nur per sia netoleremo, *ekskluzivante* ĉiun alian religioformon.

Kaj ĉiu religioformo estas rigardata de ĝiaj anoj kiel la „sola beatiga“, eĉ se ĝia kredkonfeso ne eksplicite mencias tiun ĉi konvinkon.

Tiu pretendo rezultas aŭtomate, ĉar ĉiu honesta ano de religioformo volas, ke liaj tempaj farado kaj konduto estu pravigitaj kaj lia eterna savo estu firme bazita, tiel ke li ne elektos iun religioformon, pri kiu li ne estas firme konvinkita, ke *ĝi sola* ŝajnas al li esti kondukanto al beateco.

Ju pli tolerema iu religioformo volas prezenti sin, des malpli ĝi kapablas gardi *religion*, – des pli ĝi estas en danĝero fariĝi malplena formo, eĉ se ĝi plue ŝajnas esti, laŭ sia nomo, „religio“.

Sed la netoleremo de ĉiu religioformo, necesa por ĝia ekzistado, estas bona nur *interne* de sia sfero! –

Ĉiu dommastro laŭleĝe plenumas sian *devon*, kiam li estas netolerema kontraŭ ĉio, kio povus endanĝerigi la ekziston de la mastrumaĵo konfidita al li.

Same, la respondeculoj por la plua ekzistado de religioformo estas, antaŭ si mem, rajtigitaj kaj devoligitaj esti netoleremaj, *ene* de la sfero de sia religioformo, kontraŭ ĉio, kio povus endanĝerigi la ekziston de la religioformo konfidita al ili.

Sed *ekstere* de tiu ĉi sfero de ilia religioformo *mankas* al ili ĉiu rajto kaj ĉiu devo rilate al netoleremo! –

Nur se la rajtoj kaj devoj de aliuloj en la sferoj de la religioformoj konfiditaj al *ili* estas konsciencie respektataj kaj restas zorgeme netuŝitaj, estas eblaj la interrilatoj konformaj al

la homa digno inter la diversaj religioformoj, reciproke *ekskluzivantaj* sin *interne* de siaj respektivaj sferoj kun rajtigita netoleremo, – interrilatoj, kiuj restas senkondiĉe *necesa* por la viva prosperado de ĉiu unuopa religioformo.

Ĉiu disvastigo de la netoleremo, *necesa* por la *propra* ekzisto en la *propra* sfero, transen de la limoj de la sfero de la *propra* religioformo, perturbas *aliajn* religioformojn kaj faras helpservon al la nescio kaj al la malamikeco kontraŭ *ĉio* religia en tiu ĉi miloble konfuzita tempo, vere sufiĉe fariĝinta religie laca.

Aparte de tio, tiu ĉi tempo kutimas egaligi religion al „*religiohistorio*“, kiu prezentas al ĉiu, kiu konas ĝin, ĉenon da raportoj pri *senrajtaj enmiksiĝoj* fare de interne rajtigita netoleremo en la sferojn de *alireligianoj*, ĉeno, kiun la plej granda malamikeco kontraŭ religio ne povus forĝi en pli horra maniero.

Antaŭ ĉio oni ĉiam atentu, ke religio en ĉiuj siaj formoj senescepte estas *terhoma provizora helpilo*, kiun la eterna animo de unuopuloj amplene elpensis pro zorgo pri siaj kunhomoj, por ke por tiuj *nekapablaj* mem trovi estu „markita“ vojo, kiu sekure konduku en la eternon.

Malsaĝe estas disputi, kiu el tiuj vojoj *malpli* estas „ĉirkaŭvojo“. *Ĉiuj* estas ĉirkaŭvojoj, ĉar alie ili estus tro krutaj kaj danĝeraj por tiuj animoj, pro kiuj ili estis kreataj de spertaj vojokonstruantoj.

Sed mi ne venis por konstrui novan „ĉirkaŭvojon“!

Kontraŭe, mi montras *la rektan ascendon* en la eternan lumon, ascendon kiu estas irebla nur al tiuj animoj, kiuj povas vekti en si sufiĉan forton por povi *transsalti* la abismojn, kiu-

jn *ĉirkaŭiri* oni instruas al aliuloj sur la vojo de religioformo ...

Mi ne intencas skribi apologion por iu religioformo aŭ por multaj samtempe, kvankam mi vere povus fari tion pli sekure ol la profesiaj apologiistoj de la religioj.

Mi devas indiki al la homoj ligitaj al religio la vojojn de ilia religioformo, kaj penadas trovi tiujn aŭdaculojn, kiuj provis grimpe suriri *proprajn* padojn al la lumo, sed dum sia serĉado vojeraris.

Mi devas helpi ankaŭ al tiuj, kiuj iam paŝadis sur la bone markitaj vojoj de religioformo, ĝis ili pro iu ajn kaŭzo perdis la fidon al tiu sia vojo kaj penis bati al si alian vojon tra la sovaĝejo de la skeptikeco, sen antaŭeniĝi.

Sed al tiuj, kiuj kontente kaj kun certeco pri sia afero migradas sur la sekure markitaj vojoj de la religioformoj, mi certe ne baras la vojon, eĉ se mi foje krucas ĝin.

Mi povas nur diri al ili ree kaj ree je la ĝirejoj, nekomprenblaj sed necesaj por ili, en kiu *direkto* kuŝas la *fina celo* de ilia vojo, kaj mi alportas al ili spiritan forton, per kiu ili povas efike nutri siajn malgrandajn animajn fortojn, por ke ili almenaŭ persistu sur la irata vojo, ĝis iliaj animoj estas definitive malligataj el ilia tera korpo.

La deziro fondi „novan religion“ estas same malproksima de mi, kiel la deziro servi al la ekzistantaj religioformoj *aliamaniere* ol per donado de la helpo asignita al ili el la eterna spirito laŭ ilia trezoro da valoroj transvivontaj la tempon, helpo, kiu, – kie ĝi estas bezonata, – nek postulas peton, nek atendas dankon, kaj povus esti alvokata per *neniu* surtera volo.

Pri konsento kaj kredo

Ĉiu religioformo atinginta klaran mem prezentadon plenrajte postulas de siaj anoj la honestan *konsenton* al la instruoj eldiritaj en sia mem prezentado, al difinitaj vortoj de sia fondinto aŭ siaj fondintoj, kaj al sia opinio pri certaj „historiaj“ okazaĵoj, kiujn ĝi opinias certigitaj.

Tio rilatas al la antikvaj aziaj religioj origine estiĝintaj en la diversaj regionoj, same kiel al la budhismo en ĉiuj ĝiaj formoj, al la monoteismo de la Pentateŭko, al la kristanismo en ĝiaj diversaj formoj, kaj al la Islamo, la plej juna el la grandaj religioj.

La konsento al la formulaĵo de la imagoenhavo, kiu formas la proprajaron de religio, estas nomata la „konfeso“ por tiu religio, kaj ĉar tiu konsento baziĝas sur tio, ke la anoj intime opinias vera la prezentitan imagoenhavon, kio estas sentata kiel „kredo“, oni parolas pri diversaj „kredkonfesoj“.

La interna *konsento*: – la memstarigita supozo, ke ĉio estas ekzakte tia, kia ĝi estas esprimita en la serio da imagoj, kiun religioformo pretendas kiel religian proprajon „konfidentan“ al ĝi, – estas ĉiam la decida faktoro por agnoski la anecon de homo al difinita religioformo, kio ne estas ŝanĝata per la fakto, ke la religioformo mem nomas sin „kredo“.

Certe estas iomgrade rajtigita la strebado, ke en la propraj sferoj oni aprobu nur la propran religian imagaron kaj zorgeme ekskludu ĉion al ĝi fremdan aŭ eĉ kontraŭdiran. Sed dum la paso de jarcentoj kaj jarmiloj preskaŭ ĉie okazis tiom

minaca *trotaksado* de la „kredkonfesoj“, ke la *formulaĵo* de la religiaj tekstoj, por kiu oni postulis konsenton, iom post iom ĉie fariĝis *pli* gravaj ol la religiaj tekstoj mem, kaj ke la konsento – signifanta, ke oni *opinias ion vera* – kreskegante formis preskaŭ nedisigeblajn katenojn por la interna vivo de la unuopaj religioformoj.

En preskaŭ ĉiuj religioj, la „kredo“ kiel nura, cerbe envolvita, laŭsenta procezo de „opinii vera“ grandmezure sufokis la *vivantan* fidon, kiu *estas la plej granda forto de la eterna animo*, tiel ke la laŭdiraj „kredantoj“ apenaŭ plu *scias pri ĝi*, kaj ke oni riskas renkonti plenan nekomprenon, kiam oni parolas pri ĝi al anoj de religioformo.

Sed tio estas *ne* neevitebla „fatalo“, sed sekvo de inerteco de koro, kiu povas esti *venkata*, kaj *devas* esti venkata, se ne fariĝu senvivaj ŝtoniĝoj la diversaj religioformoj, kiujn la tera homo kreis en la paso de jarcentoj kaj jarmiloj „por la homo“, – por ke ĉiu animo trovu sin tie, kie simboloj *konformaj al ĝi* markas la vojon al la interna lumo.

Sed tian ŝtoniĝon povas efektive preventi nur la profunda „viva“ *fido de la animo*, fido, kiu en kora ardo strebas en si al la memmalkaŝiĝo de sia propra vivofundo, – indiferente, en kiu religioformo tio okazas kaj kiaj ajn estas la imagoenhavoj, por kiuj oni postulas de la animo konsenton.

Tiu ĉi fido ne signifas: „opinii vera“ iun ajn historian aŭ miraklan okazaĵon aŭ iun ajn tradiciitan instruan vorton aŭ opinion, – sed tiu ĉi fido same malmulte kontraŭdiras ĉion ĉi, kio estas prezentata de la koncerna religioformo.

Homo havanta tiun fidon ekkonis nur, ke la okazaĵoj prezentitaj al li por konsento kaj supozitaj relative aŭ absolute „historiaj“, same kiel la raportitaj instruvortoj, estas nepre be-

zonataj de lia religioformo por krei la kombinaĵojn el formoj kaj koloroj, kiuj plej klare „marku“ al la animo la vojon en sian internan lumon, pli precize: *vojon facile ireblan por ĉiu animo simpatianta kun la koncerna religio.*

El sia arda koro li strebas al tio, ke li atingu sur la vojo al li montrita *sian propran vivofundon.*

Li kredas al plej interna, *nerefutebla* sentado, ke li iam je la *celo* de la vojo renkontos tiun sian vivofundon „okulon ĉe okulo“, sed, dum li ankoraŭ estas *sur la vojo*, li jam sentas sin kapabla vive ekkapti en si tion lin vivigantan, – estante libera de ĉia dubopremiĝo.

Plenigita de tia plej interna viva fido, la animo posedas sin mem *en sia centro* kaj ekde nun estas ekster ĉia danĝero povi kontentigi sin per tio, ke ĝi cerbe „opinias vera“ la imaron de sia tera religioformo.

La el si mem viva *interna* fido ree estu, *en ĉiu* religioformo de la homaro, serĉata kaj trovata de la animoj aniĝintaj al ĝi, kaj per tio ĉiu religia imagaro montriĝu, el *interne, rajtigita* en sia formo!

Sed estus nepardonebla malsaĝeco, se oni supozus, ke mi prezentas mian simpation al iu aŭ alia religioformo kaj povus malestimi aliajn.

Kontraŭe, mi scias, kie oni povas trovi en *ĉiuj* tiun *unu aferon*, kiu sola „estas necesa“, kaj mi provas instrui ekkoni, kiel ĝi estas praktike atingebla en ĉiu religioformo, eĉ se ĉiu restas el si mem devigita deklari, ke en ĉiu alia religioformo ĝi ne estas atingebla, ĉar alie ĝi ankoraŭ povus pruvi sian propran ekzistorajton nur al homoj vere „sciantaj“.

Ankaŭ estas tute ne necesa batali per rigoraj rimedoj kontraŭ la pretendon je mondvasta agnosko, pri kiu unu religioformo opinias, ke ĝi tiurilate estas supera al aliaj! –

Tiu malsaĝa, vana, erara pretendo retiriĝos ree kaj ree, sen influo de ekstere, inter siajn limojn, en ĉiu tempo, en kiu ĝi ankoraŭ ekzistas.

Pri eraraj bildoj de Dio

Sur kia ajn alto la homo eble inklinas pense imagi *sin mem*, li ĉiam kontraŭvole fariĝas al si mem *bildo kaj komparo*, kaj ne aliamaniere li pense transformas *aliajn* aferojn en si mem en bildon kaj komparaĵon.

Eĉ islamano – en sia *imagado* – ne povas malhavi bildon kaj komparon, kvankam la Islamo, laŭ strikta, sed dubinda interpreto, *malpermesas* la eksteran prezentadon de homo, malpermeso, kiu feliĉe ne preventis, ke iam en persaj kaj hindaj islamaj kulturregionoj estiĝis la plej mirindaj pentraĵoj prezentantaj la homon ardoplene kaj en brila viveco, sen kaŭzi indignon ĉe la tieaj tiamaj kredantoj.

En aliaj religioformoj, en kiuj oni *ne* kredis, ke la videble prezentita bildo de homo elvokas la danĝeron de magia superfortado, la prezentado de bildo de homo estis altigata ĝis la plej altaj eblecoj de l' arto, ĉar tie ĉi la prezentado celis esti „prediko“ kaj alstrebis la plej fortan emfazon, vidalvide al animo ĉiam preta esti persvadata de la okulo.

Sed ankaŭ por sia *lingva* prezentado la imagaro de la religioformoj tute ne povis malhavi bildon kaj komparon.

En la formo de bildo kaj komparo ĝi transiĝas en la animon de l' aŭskultanto por fariĝi ties propraĵon.

Tiu *antaŭ*-metado de diafana, plastika bildo antaŭ la spirita realo, kiu aliamaniere ne estas kaptebla al lia pensado, ja povas, sur la plej altaj altaĵoj de la animo, konduki al plej subluma sentado kaj ekkonado de Dio en la lumo de eterna amo, sed pli proksima al la tera homo estas la emo *ĉiam pli*

kompaktigi la bildon kreitan kaj imagatan de li mem, aldone ĉiam pli similigante ĝin al *surteraj modeloj*.

Kiam, ie ajn, temis pri la imagado de *Dio*, – kiel la Pra-Mem-Kreitaĵo, al kiu ĉio formita ŝuldas vivon kaj ekziston, – tiam la tera homo en ĉiuj tempoj tragike sentis la deziregon elekti siajn modelojn el *inter siaj samspeculoj*, kondiĉe ke tiuj samspeculoj *superis lin per surtera potenco*.

Tiel, en la imaga bildo de la tera homo, „Dio“ fariĝis „reĝo“ de eterna regno, kaj la animo, kiu ja volas vere sperti tion *eterne realan*, restas kaptiĝinta en la mantelaj pufoj de plastike kruda prezentaĵo de terhoma volo al potenco. –

Estas tute neeble, elpensi imagon kiu estus *ankoraŭ malpli* analoga al la *realo* de Dio!

Sed laŭ tiu tera baza formo estas formitaj la imagoj pri Dio de la plej grandaj religioj, kiujn la tera homo donis al si...

Kvankam milionoj celas adori tiujn ĉi imagajn bildojn per la tuta forto de sia anima amo, dum nur la timo antaŭ la laŭkreda potenco de l' imagita Dio devigas aliajn milionojn servi lin, oni ne devas miri, se pli kaj pli kreskas la nombro de tiuj, kiuj fine sukcesis venki sian obtuzan timon aŭ iam vidis sian ardan amon estingiĝi en amara ekkono, kaj nun rigardas *ĉiun* imagon pri Dio kiel trompan homan faritaĵon, ĉar ili ekkonis *la sian* kiel tian.

Neniu estas tiom granda obstaklo al si mem sur sia vojo kiel la seniluziiĝinto: – tiu liberiĝinta de iluzio, de trompiĝo!–

En sia kolero pri tio, ke li povis trompiĝi, li ne vidas, ke nur lia *imaga bildo* kaŭzis la trompiĝon, kaj tial li opinias, ke la *realo* pruviĝis nereala, dum nur *bildo* de la realo disfalis.

Estas senutile riproĉi al la seniluziiginto „nekredadon“, sed estas necese montri al li, kiel li povas *en si mem spertion realan*, al kiu li vane provis proksimiĝi trae de sia imaga bildo nun por li detruita. –

Por instrue montri tiun manieron – sperti en si mem tion realan kiel la prafundon de la propra ekzisto –, oni certe ankaŭ ne povos malhavi imagobildojn.

Sed en tiuj ĉi imagobildoj oni plej zorge evitos ĉiun teran modelon, kiu ne estus travidebla en plej klara diafaneco.

Kaj ĉio, kio povas esti dirata per bildecaj vortoj, servos nur por vekti en la instruato la imagon pri la *strukturo* de la eterna realo, *en* kiu kaj *el* kiu li mem vivas.

Dio estas tiom *multa* kaj tiom *multflanka* kaj *diversa* en la sama tempo kaj sama eterneco, ke neniam estus eble diri, kio estas Dio, se ne estus eble, kvazaŭ desegni per grandaj linioj la strukturon de la spirita vivo, kies memkonscio estas Dio.

La esto-aspektoj de Dio, kiujn mi tiumaniere desegnis, elirante de la spirita nombra efiko *Unu*, plue tra la diversaj nombraj efikoj penseblaj al la homo nur kiel „interaj“, ĝis la nombro *Dek du*, estas celataj de mi ekskluzive en tiu senco. Oni neniuloke pensu je aranĝo „unu apud alia“ aŭ „unu super alia“, kiu sola estus ebla en la surtera sfero, sed oni provu *ek-senti* kvazaŭ sen-interspacan, egale eternan aranĝon *unu en la alia*, ĉar oni ne povas „imagi“ tiun mem-estadon reciproke sin plenigantan en la strukturo de la eterna spirito. Kaj mi ne intencas peri „imagon“ tie, kie mi povas alproksimiĝi *la realon mem* al la sentada kapablo de miaj kunhomoj.

Kiom proksimiĝis la eterna realo al ili en miaj vortoj, kelkaj homoj *antaŭsentos*, – aliaj vekigante *spertos*, tiom longe dum tiuj ĉi vortoj restas atingeblaj al homoj.

Pri la celo de ĉiu instruado

En ĉiuj siaj infinitoblaj memmanifestiĝoj ene de la strukturo de l' vivo en la eterna spirito, „Dio“ estas al si mem, en *ĉiu* memvolita propra formo, *eterna absoluta memsentado*.

Tial la vera fina celo por ĉiu tempa volado kaj agado, volo al ekzisto, kaj dezirado de formo de la tera homo estas: – *memkonfirmado* de liaj diaj eternaj animeroj en la propra *memsentado*, ĉar nur en tiu memsentado la animo povas ree eniri en Dion kaj ekkonscii Dion en si.

Nur memkonfirmado *per memsentado en la memsentado de Dio* ebligas la aman unuiĝon kun Dio en Dio.

Antaŭe, la animo staras nur en ama „*preteco*“ kaj ĝia laŭsupoza „*amo*“ al Dio estas ama „*deziregado*“, kaj ĝi prezentas sian aman forton al „*io super ĝi*“, je kio ĝi estas admonata kredi, – sed kion ĝi tute ne konas.

Nur en la individua animo, kiu unuigas la eternajn animerojn por eterne, la animeroj povas regajni sian memsentadon en la eterna spirito, el kiu ili elradiiĝis, por, memformiĝinte, esti reensuĉataj en sian originon, kristaliĝinte al eterna konsciokerno, kiu tralumas ilin ĉiujn kaj donas sian eternan propran koloron al ĉiuj apartenantaj al ĝi.

Sed tie ĉi estas parolate ne pri nur *pensata* procezo, sed pri *reala okazado*, kaj ĉiu instruado servas nur por alkonduki tiun ĉi *okazadon* en la animo, per tio, ke ĉiuj eraraj imagoj, kiuj malhelpas la ekiĝon de la okazado, estas laŭeble *foriga-*

taj, por krei spacon al tiaj imagoj, kiaj efike *preparas* la ek-
iĝon de la okazado.

Do, ĉio, kion mi necese devis diri pri tio Unu kaj Infinito-
bla, kio estas „Dio“, estas donita ne por esti dispecigata en
pensa spekulativado, sed por ree veki en la animo tiujn ima-
gojn, kiujn ĝi nekonscie konservas en si ekde la eterna origi-
no de la animeroj.

Tio, kion mi diras, ne atendas pretecon kredi kaj ankaŭ ne
volas esti „komprenata“, sed celas konsciigi en la eternaj ani-
meroj la memorojn respondajn al ĝi. En tio la enprenanto
sukcesos des pli, ju pli li povas repeli sian spekulativan
pensadon, al kiu miaj vortoj estas nur materialo por liaj inte-
lektaj ludoj.

Temas pri reala *ŝanĝo* de la stato de konscio de la animo,
kaj ne nur pri alia maniero „*pensi*“.

Nur tiu ĉi grava ŝanĝo en la stato de konscio, kiun surtere
oni normale opinias neŝanĝebla, alportas al la animo la ne-
renverseblan *certecon*, al kiu ĝi ĉiam vane strebas per cerba
laboro.

La eterna realo estas neatingebla al pensaj konkludoj.

Ĝi povas nur esti *sentata* en la konscio kaj alportas kon-
firmon nur en la *sentado*, – sed konfirmon, kiu estas tiom
kompleta kaj perfekta, ke ne restas eĉ la plej milda deziro pri
pensa kaptado de tio atingita.

Por *ebligi* tian sentadon, mi elektis la vortojn ĝin portan-
tajn.

Oni ne miksu ilin kun aliaĵo sonanta simile!

Sed oni ankaŭ ne praktiku kulton pri ili kaj ne serĉu, cer-
bumante, sekretajn signifojn en ili.

Sed oni enprenu ilin tute simple kaj sentu ilin en sia animo tiaj, kiaj ili estas donitaj.

Neniam oni faru ilin bazo kaj elirpunkto por propra spekulativado!

Krome, mi ne atribuas ian valoron al pensa „konsento“, kaj nenio estas pli malproksima de mi ol la volo por „konvinki“ per persvadado.

Mi vokas la leganton *al la praktika elprovado* de miaj vortoj.

Sed por ke ili povu elprovataj praktike, ili devas esti *sentataj*, ĝis ili estas la sentada *propraĵo* de l' enpreninto.

Miaj vortoj estas antaŭ ĉio: – *sentado-portantoj*, *sentado-perantoj* kaj *sentado-vekantoj*.

Kion ili krome diras laŭ la „senco“, estas de *sekundara* naturo, kvankam ĝi certe povas helpi konsili al la animo la enprenon de la vortoj.

Ankaŭ laŭ ilia „senco“ miaj vortoj estu enprenataj precipe kiel *sentadovekantoj!*

Kiurilate mi estas nur transdonanto

Estas nek mia surtera tasko donita de la spirito, nek mia ter-homa intenco dezirita de mi, nek mia volo, antaŭdiri okazaĵojn, kiuj estonte povas okazi aŭ devas okazi kaj okazos.

Mi neniam komprenis, eĉ nur sentante kaj ĉe aliuloj, la deziron voli antaŭscii, kion la estonteco alportos, kaj mi sentus kiel neporteblan ŝarĝon, se mi devus gardi en mi la konon de estontaj eksteraj okazaĵoj aŭ estus eĉ devigita antaŭanonci ilin.

Se tamen troviĝas lokoj en miaj libroj: – en la „libro pri la vivanta Dio“, en la „libro pri la homo“, en la social-etika instrua skribo „la fantomo de la libereco“, kaj antaŭ ĉio en la „libro de la amo“, – kiuj atentigas pri estontaĵoj en la regiono de surteraj ebloj de la homo, tiam temas pri io multe pli signifoplena ol iam povus esti antaŭdiro pri estontaj eksteraj teraj okazaĵoj.

En senescepte ĉiuj tiuj lokoj mi *ne* trovis min instigita *de ia ajn antaŭscio* de difinitaj teraj okazaĵoj por skribi tion, kion mi skribis, sed havis la spiritan devon doni *esprimon* en vortoj de mia lingvo al *tio donita* al mi el mia eterna spirita prafundo.

Sed al tia spirita devoligo tute ne estas ligita tera, cerba sciigo pri tio, al kiuj difinitaj datoj, personoj kaj eksteraj oka-

zejoj la enhavo de tio spirite montrita rilatas, aŭ per kiuj cirkonstancoj estas kaŭzota la okazo, pri kiu temas tio transdonita al mi por anoncado.

En aliaj vortoj: – rilate al ĉiuj lokoj de miaj skriboj, en kiuj mi parolas pri estonta tera okazado, mi estas nur *transdonanto* de pure spirita mesaĝo komisiita al mi, kaj mi ne kapablas doni komentojn pri tio dirita.

Ĉiu leganto mem interpretu laŭ sia maniero *tion esprimantan* de mi en vortoj, se li sentas emon por tio!

Mi tiurilate estas neniel privilegiita antaŭ li, sed ankaŭ ne havas la rajton prezenti privatan propran interpreton de tiaj lokoj al la publiko, aŭ eĉ nur al la homoj plej proksimaj al mi en la surtera vivo.

Kie mi kiel spirita komisiito devas doni al tio ricevita la lingvan formon por komunikado, tie mi scias nur, ke, kaj kial, la enhavo estas *nerenversebla, absoluta certeco*, kaj mi devus redoni ĝin, eĉ se mankus al mi ĉiu, *al mi sola destinita* ebleco de interpretado.

Sed kie mi prenas el tio mia *propra* en la eterna spirito tion, kion mi kapablas diri kaj kion mi havas por doni, tie oni certe neniam rimarkos, ke mi parolas kiel antaŭdiranto pri estontaj aferoj, escepte se oni alkalkulas al ili la „transan“ vivon, kiu ja estas por miaj legantoj io ankoraŭ estonta, – sed por mi konstanta estanteco *apud* la *samtempa* ekstera fizika surtera vivo.

Sed mi vere ne negas, ke *el tio mia propria* en la eterna spirito mi konscias *estontajn* aferojn, same kiel antaŭ longe *estintajn* kaj nun surtere *estantajn* aferojn.

Sed tiu konsciado estas *post*-spertado de tio, kio *iam* estis sentata en homaj animoj per ties spertado, – *kun*-spertado de tio, kio estas sentata en la surtera *estanteco* rezulte de terhoma anima spertado, – kaj *antaŭ*-spertado de tio, kion nur *estonta* okazado alkondukos al anima sentado.

En neniuj tempopunktoj de tia spertado kaj sentado ligiteco mi samtempe konscias *la eksterajn cirkonstancojn*, kiuj ekigis, ekigas aŭ ekigos tion *anime* kunsentitan de mi.

Mi mem fiksas al tiu mia kunspertado la plej ekzaktajn limojn, de kiuj mi fortenas ĉion, kio ne nepre *devas* esti kunsentata de mi kaj tamen deziras enpremiĝi en mian konscion.

Sed kio, laŭ mia spirita devo al kunsentado, estas enprenata, sentata kaj spertata de mi, tio estas destinita nur por mia *propra* anima spertado, kaj neniam fariĝu objekto de antaŭdirado, eĉ se ĝi entenas en si ion estontan.

Kial tamen en diversaj tempoj estis destinite al mi, – el la konscio kaj volo de Tiu, en kiu mi estas naskita el la spirito, – *atentigi pri io estonta*, malkaŝiĝos nur al *estontaj* homoj.

Antaŭ ol *konfirmiĝis* tio, kion miaj vortoj devis anonci al estonta tempo, kiun mi mem ne povas nun mezuri laŭ tera mezuro, neniuj povas ekkoni tion, kion estontaj generacioj ekkonos el la konfirmo *prezentita al ili*.

Al kiu mi havas nenion por diri

Ĉio, kion mi venis por diri, estis dirata nur por voki tiujn, *kiujn ĝi celas*, al ilia konscia vekigo en la eterna lumo de la spirito, kiu estas ilia substanco vivoprafundo kaj tial la sola garantio por daŭranta vivo.

Sed mi ne volas vekigi *tiujn*, kiuj ankoraŭ *bezonas* la dormon. Al ili mi havas *nenion* por diri, kaj kion ili tamen aŭdas, kiam mi parolas al la miaj, tio restas al ili nur kiel sono kaj kanto, kiun la orelo de dormanto enprenas sen kapti la sencon de tio aŭdita.

Ili ankoraŭ dormas kun okuloj malfermitaj, kaj la mondo de iliaj sonĝoj estas ilia sola konscia „realo“.

Oni devas lasi la sonĝantojn plue dormi, ĝis ili mem iam laciĝas je dormado, – jam dum sia surtera vivo, aŭ nur tiam, kiam la helpo, kiun ilia tera korpo prezentis al ili, fariĝis neatingebla por ili.

„La nokto, kiam neniu povas labori“ estas „nokto“ nur por tiu, kiu ne strebis al utiligado de la spirita helpo prezentita de lia tera korpo, kaj nur pri homoj kiel li estas dirite, ke „neniu“ povas „labori“ en malluma nokto.

Ne estas tute facile travidi siajn sonĝojn en la luma tago kaj ekscii, ke la sonĝata realo estas „realo“ nur por la *sonĝo*, kiu okazas en ĝi.

Sed estas nedireble pli facile veni al tiu ekkono, dum la tera korpo ankoraŭ povas doni teran resonon al la sentado de tio eterna, ol post la korpa morto, kiu definitive forprenas tiun eblecon.

Tiuj, kiujn oni devas lasi plue dormi, ĉar ili ne tre baldaŭ laciĝos je dormado, kompreneble ne suspektas, kaj ne *volas* suspekti, ion pri tiuj ĉi aferoj, kio povus vekti ilin.

Ili sentas sin tro bone en sia sonĝado, kiun ili nomas sian „maldorman pensadon“, ol ke ili kapablus senti en si eĉ la plej malgrandan impulson ŝanĝi sian staton por alia.

Kredante, ke ilia cerba pensado heligos ĉiun mallumon, ili ĉie supozas eraron kaj trompon, kie al ilia sonĝata ekkonado tia heligo estas neebla, ĉar nur la vekiginta *sentokapablo* de la animo povas percepti la substancan lumon de la eterna spirito.

Kaj neniu el la tiom memcertaj sonĝantoj ekkonas, kiom valora *lia tera korpo* povus fariĝi al li, se li scius utiligi ĝin kiel portempe donitan sentado-plifortigilon, kiu nedireble plifaciligas al la animo alproksimigi tion en la spirito delikate sentatan al la cerba konscio.

Al tiuj ĉi homoj tiom certaj pri si mem mi havas nenion por diri, kaj kion mi diras, ne estas dirita por ili. Nur se ilia granda certeco iam fariĝis suspektinda al ili mem, ili povos trovi min, kaj nur tiam mi havos ion por diri ankaŭ al ili.

Sed *neniam* mi havas ion por diri al *tiuj*, kiuj ronĝas – kiel arvikoloj la radikojn – ĉiujn sekretojn, kies ekkono ne estas destinita al ili.

Ankaŭ ili sonĝas kun okuloj malfermitaj, kiel la aliaj, sed ilia sonĝado estas ĝuado de malpura kaj kaŝa avido je povo super potencoj, kiuj pro bona kaŭzo estas neatingeble superordigitaj al ili.

Eĉ se tiaj pirataj cerboj en scencia aroganteco aplikas al si ĉion, kion mi havas por diri al aliuloj, tio tamen neniam povas fariĝi ilia propraĵo, ĉar tio, kion mi havas por diri, devas esti *sentata*, – sed tiuj aviduloj je kaŝa potenco volas ruze esplori la kaŝan *fonon* de la aferoj, pri kiuj mi havas por diri al aliuloj, ke oni povas nur *eniĝe ekkoni* ilin.

Kiu vere volas aparteni al tiuj, al kiuj mi havas ion por diri, tiu devas ĵeti tre foren de si la eraran opinion, ke mi volas alporti al li „scion“, kiun li povas aldoni al sia ekzistanta scio kaj tiel ekposedi ĝin.

Li kaptas tion, kion mi havas por diri, nur tiam, se li sentas en ĉiu vorto nur mian volon *vek*i la *sentokapablon de lia animo*, kaj nur tiam miaj vortoj vere „havas ion por diri“ al li.

Ĉio, kion mi diras, volas esti *sentata* kaj ne estas donita kun la intenco prezenti al la sagaceco de la leganto taskon por ekzerci lian arton de pensa analizado.

Mi ankaŭ havas *nenion* por diri al tiuj, kiuj diligente provas adapti tion ĉe mi aŭditan al io alia iuloke eksciita, ĉar tio, kion mi donas, estas tuj *falsata*, se oni interpretas miajn vortojn tiumaniere, kvazaŭ ili helpe subtenas iun ajn filozofian aŭ religian sistemon.

Tio, kion mi diras, estas atesto pri eterna spirita realo kaj envortigiĝis nur el ĝia memsentado.

Tio, kion mi donas, egalas bone desegnitajn mapojn, kiuj protektas la vojaĝanton kontraŭ devojĝo.

Sed kiu volas ekvidi *la landon mem*, al tiu ne utilas „*scii*“ pri la vojoj.

Nur se li *mem ekiras* ilin, proksimiĝos al lia sentado tio, kio antaŭe estis kaŝita al li.

Pri la savo de la eterna animo

Se ree kaj ree estas dirate, ke la vojo al la eterna lumo, eĉ la eterna lumoregno mem, – el kiu originas la nedetruibla kerno de spirita homeco: la substanco eterna „spirita fajrero“, kaj en kiun tiu kerno devas reveni kun aŭ sen la individua konscio de l' tera homo, – estas trovebla nur „interne“, oni per tio ne celas diri, ke la tergenerita homa naturo ĉirkaŭfermas en si la eternan spiritan lumoregnon kaj la vojon al ĝi tiel, kiel vazo ĉirkaŭfermas sian enhavon.

Pli ĝuste, la homo de tiu ĉi tero estas kunaĵo el tre diferencaj *regionoj de sentokapablo*, kaj la vojo al la lumo kondukas de unu regiono al la alia, pli kaj pli proksimen al la plej interna.

Ekde plej antikvaj tempoj, ĉiuj kiuj sciis pri tiu vojo prezentis ĝin per la bildo de vico da ŝtupoj kaj de supreniro sur ili, tamen oni tie ĉi ne pensu je vojo al la malproksimo, sed oni ĉiam memortenu, ke ĉiu „ŝtupo“ sur la „vojo“ al la lumo estas ŝtupo *internen*, kaj estas „pli alta“ nur tial, ĉar ĝi situas *pli interne*.

La „vojo“ estas formita el samcentre aranĝitaj regionoj de pli kaj pli luma sentokapablo.

Oni povus prezenti ĝin helpe de teknika kompreniga modelo, per tio, ke oni fiksus antaŭ lumfonto ne tro malgrandan nombron da vitroplatoj de diferencaj koloroj, tiel, ke unu vitroplato post la alia povus esti forigata.

Unue, apenaŭ brileto de la lumo penetras la kolorajn vitrojn, sed ju pli de la eksteraj vitroj (kiuj devus krome esti la

plej malhele koloraj) oni forprenus, des pli klare la okulo perceptus la formon de la lumo brulanta interne, kiu tamen estus ankoraŭ vidata tra diversaj koloroj, ĝis fine la forpreno de la plej interna, tute senkolora, ronda vitroplato rivelus la realan *propran koloron* de la lumo.

Ennaskita, laŭ sia animala naturo, en la ekstera fizika mondo al ĉiuj konata, la homo opinias, ke estas lia kvazaŭ evidenta, pleje eĉ sola tasko, ekkonscii kaj esplori nur la *plej eksteran* regionon de sentokapablo, kiu ampleksas ne pli ol la animalan animon.

Sed malgraŭ la preskaŭ netralasa denseco de la *ekstera* sentoregiono, kiu sola estas konata al ili, ĉiam homoj sentante perceptis en si la internan lumon, kvankam ĝi povis ekbrili al ili nur en la maniero de io suspektata.

Tiel la homo malkovris, ke ankoraŭ aliaj regionoj de sentokapablo estas donitaj al li, tra kiuj li povas proksimiĝi al la suspektata lumo, kaj eĉ se li pleje venis ne pli foren ol en la regionon de *bildoj*, kiu trovas esprimon en la revelacioj de liaj religioj, tamen io decida estis atingita per tio.

Ĝis tie ĉi povis esti kondukata ĉiu homo, por ke li konsciiĝu pri sia plejinterno almenaŭ *per bildo*.

Sed al multaj estas eble atingi *pli*, kvankam ne ĉiuj el ili havas la forton de fido, kiu estas absolute necesa dum jaroj aŭ eĉ jardekoj por atingi tiun regionon de sentokapablo, en kiu *la eroj de la eterna animo* povas esti sentata senpere, aŭ tiun *plej internan* regionon, en kiu sola *la eterna spirita fajrero*, je kiu la eternaj animeroj „kristaliĝas“, donas sin al la sentado de la tera homo kiel ties proprajon.

Sed tiel, kiel en la *ekstera* surtera vivo multaj signifoplenaj kaj direktomontrantaj aferoj tute ne estas sperteblaj kaj kompreneblaj al *ĉiuj* homoj, kvankam la efikado de tiuj aferoj fariĝas sentebla al la tuta homaro kaj ne ekskluzivas iun, kiu ne ekskluzivas sin mem, tiel ankaŭ plene sufiĉas *scii*, per la diskonigado fare de la lumantoj de la pralumo, – kiuj solaj kapablas sperti en la koncernaj regionoj kaj en la paso de la jarmiloj ĉiam denove trovis sian diskoniganton – pri la aferoj spirite sperteblaj kaj trapenetreblaj ne al ĉiuj, se oni volas eviti la danĝeron ekskluzivi sin mem per malĝusta volodirekto.

La „savo de la animo“ estas destinata *per la volo*, ne per tio, ke oni opinias veraj iujn raportojn kaj kredinstruojn!

Kiam la volo de la tera homo *rifuzas* akcepti siajn direktivojn sole nur *de sia animala animo*, la homo starigas sin *per tio sola* sub la gvidado fare de la eterna spirita fajrero spertanta sin en li. Rezulte de tio lia *eterna* animo iom post iom ricevas *tiun formon*, kiun ĝi bezonas por povi enpreni sian alie paseman individuan konscion en sian eternecon.

Tiu „transfuzo“ okazas tute nerimarkite, kaj nedepende de tio, kiuj internaj sentoregionoj jam fariĝis alireblaj al la tera homo.

Nur la propra *volo* de l' homo povas disigi tion, kio tiu-maniere kunfandiĝis.

Pri la prokrastanta demandemo

Se ricevita respondo ekigas novan demandon, tio plej klare montras, ke la respondo *ne estas enprenita kaj „alproprigita“*.

Kiom ofte ankoraŭ mi devas diri, ke vere ne estas mia tasko, alporti al la senbride kreskeganta demandemo de la cerba intelekto nenecesan stimulon por ĉiam nova demandado!

Pli ol estis mia devo, mi indulge komplezis al la homa malforteco, kiu konsistas en senlaca demandado, sed oni certe ne povos aserti, ke mi ne ree kaj ree atentigis pri tio, kiom senvalora estas ĉiu scivolo disipanta sian energion je senlima demandado, kaj kiom senutila estas ĉiu respondo, kiu ne kondukis al *propra* respondado de demando.

Eĉ se oni scius ĉion, kion la plejsaĝuloj de ĉiuj tempoj diskonigis kaj skribis en la lingvoj de siaj landoj pri la profundo de l' homa spirita vivo, oni ne estus alproksimiĝinta al tiu sia *propra* spirita profundo eĉ je la larĝo de haro.

Sed oni povas sentante ekkoni ĝin, sen koni eĉ unu vorton de tiuj saĝuloj, – sen scii la plej malgrandan eron pri tio, kio povas esti dirata pri tiu eterna spirita profundo de la terhoma spirita vivo.

La cedo al tiu dezirego demandi kaŭzas ĉiufoje konsiderindan malfortigon de la sentokapablo, kaj prezentas konsenton pri la provo, per netaŭga rimedo, eble pli facile akiri *per la intelekto* ekkonon, kiu estas atingebla nur per *sentada, interna spertado post la paso de asignita tempo*.

Kiu volas ricevi respondon *de ekstere*, estas preta kontentigi sin per pense kaptebla *prezento* de io, kio fariĝu propraĵo en sia plena *realo*, sed kiel tia fariĝas perceptebla nur al la *sentado*.

Kiu opinias, ke li povas montri sian altan inteligentecon antaŭ si mem kaj aliuloj per la metado de ĉiam novaj demandoj, tiu trompas sin mem, ĉar li strebas al decido, kiu neniam povas esti farata tie, kie li tiom memcerte serĉas ĝin.

Li egalas homon, kiu volus ascendi per aviadilo por kapti fiŝojn – en la nuboj!

La demandoj, kiuj dum la serĉado de lumo kaj enlumiĝo estas vere *rajtigitaj*, ne povas esti esprimataj per vortoj, sed ili formiĝas nur al la *sentado*, en kiu sola ili trovas sian respondon.

Sed ĉia demando *en vortoj* kaŭzas nur prokraston de la respondo atingebla *en la animo mem*.

Ja ne temas pri io, kio povus kontentige esprimata per vortoj, eĉ se la plej mirakle belaj vortoj prezentiĝus por tio.

Tio atingenda ankaŭ ne estas io, kio povus esti *tia, sed ankaŭ alia*, eĉ se ĝi povus esti nomata per parafrazoj miloble diferencaj.

Temas sole pri la kaŝa substanca prafundo de la propra tempa ekzisto kaj de la propra esto en la eterna substanca spirito.

Se la tera homo nur unufoje korpe spertis en si tiun prafundon de sia propra vivo, kiu aktivigas tra ĉiuj generacioj kaj individuigas sin denove en ĉiu unuopulo, tiam li ekstremante vidas, al kia malsaĝeco li iam estis subfalinta, kiam li ankoraŭ opiniis, ke tio Unua kaj Lasta, – Unika kaj Infinitobla, –

povus fariĝi objekto de demando en vortoj kaj povus fariĝi respondo al vorta demando ...

Ĉiu informo pri internaj interrilatoj en la eterna substanca spirita vivo neniam povas anstataŭi la konsciiĝon en la propra interno, kaj neniu pensa prezento iam povas krei la certecon, kiun nur la *interna spertado* de tio Unu, kio vive ampleksas en si ĉiun nombron, estigas en la korpeca sentado.

Tie ĉi finiĝas ĉiu regiono de demandado, kaj ĉiu pense nutrita deziro demandi estingiĝis.

Kvankam tiu eniro en la plej internan regionon de sentokapablo vere estas donata nur al malmultaj, ĉar nur la plej malmultaj scias atendi ĝin, tamen maldorma enrigardo restas malfermita al ĉiuj, kies sentado celas enigi sin en tion eternan: – *sendemande rezignante* pri ĉiu cerbe kondiĉata dezirego demandi, kaj turninte sin al la *realo*, kiu povas malkaŝi sin nur al la sentadokonscio.

Pri la tempa kaj eterna animoj

Ke homoj povis diri, ke animalo *ne havas animon*, ŝajnas nekapteble malsaĝe, sed ankaŭ fariĝas nekomprenebla vidalvide al la certeco, ke la granda plimulto de la teraj homoj konas nur ĝuste tiun ĉi animalan animon kiel la propran „animon“, sed apenaŭ aŭ tute ne kapablas percepti la animon formitan el *eternaj* animeroj kaj laŭ sia substanco *persistantan en la daŭro*.

Tamen tie ĉi temas nur pri bone komprenebla eraro, kiu konsistas en tio, ke la homo alkalkulis ĉion superfizikan, kio en li, kiel en la animalo, estas nur funkcia rezulto de la vivo de la ĉeloj de lia videbla laŭanimala korpo, al sia *eterna* animo, pri kies ekzisto li estis sciigita fare de homoj kapablaj sperti sin en ĝi.

Ke observado tamen igis la teran homon malkovri en la animalo ion saman kiel tion, kio en li mem ŝajnis aparteni al la eterna animo, montriĝas sufiĉe klare en la ofte ripetiganta fabela motivo, en kiu aperas animaloj, kiuj verdire estas animale vualitaj *homoj*, aŭ homoj *ensorĉitaj* per la forto de malicaj sorĉistoj.

Estis timige al la homo, ke, kvankam la animalo laŭ la plej multaj kredinstruoj „*ne povis havi animon*“, li tamen devis percepti je ĝi ion animan, kaj kie la religia kredo allasis la ideon de transmigrado de animo de unu estaĵo al alia, tie la imago, ke homaj animoj troviĝas enkatenitaj en animaloj, ne renkontis ekskludan reziston, precipe ĉar la kredo je metemp-

sikozo estis mem nur sekvo de tio, ke oni perceptis egalajn ecojn kaj egalajn kondutojn ĉe homo kaj animalo.

Kiel mi koncize montris en la mallonga traktaĵo „En Sof“ en la „Libro pri la vivanta Dio“, la nokto de praesto, en eterna rigideco skuante sin mem, seninterrompe elĵetas mallumajn fortojn: kvazaŭ splitojn de sia propra, eterne neelĉerpebla substanco, – eternan praeston, kiel ĝi mem, – kiuj post ilia efikado en difinita krea ciclo returnas en ĝin.

Mi tie montris, kiel tiuj eroj de la praesto estas la kaŭzo de ĉiu formado en la universo.

Sed mi ankaŭ montris, en kiuj tre diversaj formoj ili aktivas.

Unun el la plej subtilaj de tiuj formoj mi montris en la fortoj eklumantaj en la „pralumo“ al absoluta klareco, el kiuj formiĝas la individua formo de la eterna animo de l' homo.

Sed tiu formiĝo povas okazi nur tiam, se la eterna „spirita fajrero“, – kiu estas daŭra individuiĝo en la eterna spirito kaj fariĝas bazo de ĉia individuiĝo en la tempo, – igas, ke tiuj „animeroj“ kristaliĝas al ĝi per tio, ke la volo de la tera homo translasas ilin al ĝi por unuiĝo.

Kiel ĉio formita, ankaŭ tio animaleca de la tera homo, kaj, kun ĝi, ties volo, estas nur sekva fenomeno de la efikado de tiuj eroj de la praesto, kiuj returnas en la nokton de la praesto, post kiam ili plenumis la cyclon de sia tempa aktivado.

En la animalo, tiu plenumado okazas per la formiĝo de la *animala animo*, kiu ankaŭ *en la tera homo* – kiom li estas animalo – prezentiĝas kiel nur tempa funkcia rezulto de lia animala organismo, kaj ĉesas ekzisti, tuj kiam tiu ĉi organismo ne plu povas plenumi siajn vivokondiĉojn.

La decida diferenco inter animalo kaj tera homo konsistas en tio, ke la homo, eĉ en sia animala ligiteco sur la tero, restas kapabla konsciiĝi pri si mem kiel la eterna „spirita fajrero“ el la pralumo. Kaj ene de la surtera vivo tio estas ebla nur pro tio, ĉar la tera homo estas ne *nur* la sekva fenomeno de la efikado de praesto-elementoj kapablaj formadi nur en la fizika regiono, sed li trovas en si mem tiujn altajn, *tralumigebajn* praesto-elementojn, – kiuj jam sole pro sia propra eterna daŭro kaj eterna konsisto garantias al lia animo „senmortecon“, – en *rekta rilato kiel sian proprajon*.

Estas la necesa tasko de la tera homo, tasko kiun li stariĝis al si mem per sia ekzisto, *unuigi* la altan formon de la praesto-elementoj, – kiuj, eklumante kiel „praesto“ en la „pralumo“, formas liajn animerojn, por fine servi, en la „pravorto“, al la daŭra formado de la anima formo, – en la punkto de kristaliĝo de tio sia eterna!

Sed tio okazas nur per *konstanta* ago de la terhoma *volo*, kiu estas nur sekva fenomeno de la aktivado de la primitiva formo de la eternaj praesto-elementoj, kies *plej alta* formo alirebla al la tera homo estas liaj propraj eternaj animeroj.

Ĉiu sentado de la eterneco estas ebla al la homo, „falinta“ en la teran sferon, nur pere de la eternaj animeroj, – sed nur tiam, se ili trovis sian mastron kaj majstron en la eterna „spirita fajrero“ de la homo, kaj en ĝi *la unuiĝon*.

Kiom ajn mistere sublimes ĉiu unuopa eterna animero estas, ĉiu el ili havas sian propran volon kaj – sen kuniĝo en individue difinita animoformo – aktivis *nur por si mem* kaj *por sia propra strebado*.

Malgraŭ ĉiuj siaj animeroj, la tera homo povas tamen perdiĝi al tio sia eterna, se li ne *konstante* penas – laŭ ĉiu, kvan-

kam terece limigita ebleco – konformigi sian teran, sekundaran volon, kiu estas nur la *sekva fenomeno* de spiritaj praes-teroj, al la *primara* volo de la eterna spirita fajrero en si.

Ĉar nur en tiu ĉi volo *difinita sole de la eterno* la eternaj animeroj povas esti unuigataj, laŭ difinita, spirite prezentita formo, en la nepereonta eterna homa animo.

Nur tiel okazas ankaŭ la „festa unuiĝo“, en kiu la nur tera konscio de la homo ricevas, el la *eterna spirita homeco*, la fekundigon per la ekkono de la propra eterna spirita fajrero en si, post kio en la homo, nun spirite lumigita, „lia vivanta Dio“, „naskiĝas“ en la propra, individue formita animo.

Kio restas post la morto

Certe estus ĝusta la supozo, ke post la morto de la homa korpo la animala animo de la homo, kiu animo estas nura funkcia rezulto de la korpo nun fariĝinta nekapabla por iu funkcio, devas esti estingita, kune kun ĉio kio iam estis spertata en ĝi, kiel ĉe ĉiu animalo, al kiu la morto finas ankaŭ la animon, – se la animala animo de la tera homo ne estus eniĝinta dum lia korpa vivo en tiom intensan sentadan komunicon kun la *nepereonta* animo, ke tio spertita en la animala animo estas plej multoble intertekstata kun la eroj de la eterna animo.

Post la morto de la homo, ankaŭ lia animala animo *ne plu povas ekzisti*, sed tio, kio *estis spertata* en la animala animo de l' homo *ĝis ĝia estingiĝo*, estas ankoraŭ konservita en la eternaj animeroj apud kaj sub ties propra spertoenhavo, kaj – laŭ tera tempomezurado – estas necesaj jardekoj, jarcentoj, jarmiloj aŭ pli, depende de la speco de tio spertita kaj la intenseco de ĝia enstampiteco, ĝis povas esti farata la definitiva kribrado laŭ la volo de la eterna animo, dum kiu procezo estas decidate, kiuj memoroj estu *retenataj* en la eterna konscio kaj kiujn la animo deziras *esti estingitaj por ĉiam*.

La eternaj animeroj, kiuj en miriada nombro konsistigas la animon, kies formon la homo kreis dum la surtera vivo per sia volado kaj agado, *kunsentis* kaj *kunspertis* tion, kio iam estis sentata kaj spertata en la animala animo, kaj konservas ĝin en la konscio de la *nepereonta* animo, ĝis tiu ĉi animo decidis per sia propra volo, kio estu retenata en ĝi, kaj kio foriĝu el ĝi.

Estas neeble fari tiun decidon tuj post la morto de la tera korpo, ĉar la diversaj spertoimpresoj originintaj el la animala animo estas enstampitaj kun tute diferenca intenseco, depende de la impulsoj, kiuj impresis la sentadon en la animala animo kaj samtempe kunvibrigis la eternajn animerojn.

Ne pli frue la nepereonta animo estas libera decidi, kion ĝi volas reteni en sia daŭranta konscio kaj kion ĝi volas eligi, ol kiam estas forkonsumita la tuta impulsa forto, per kiu iu sentado en la animala animo povis enstampi sin en la *eternaj* animeroj.

Sed ĉiu *konscio de identeco* estas entenata nur en la sentadaj kompleksoj, pri kiuj la *eterna* animo volas, ke ili estu iam *inkluditaj en ĝi por ĉiam*.

Kion ĝi elpuŝas, tio estas estingita por ĉiam, kiel post la morto *de animalo* estas estingita ĉio, kio iam fariĝis konscia spertado en la animo de la animalo. El ĉiu animala spertado nur tio povas eniri *en la daŭrecon*, kio kiel homa sento tuŝis *la eternajn animerojn de homo*, kiu *prenis parton* en la spertado fare de animalo, kaj postlasis en ili impresojn en la formo de ĉeestantaj memoroj.

Sed la mallumaj praesto-elementoj sen propra konscio, kiuj estis la kaŭzo de la vivo, formo kaj animala animo de la animalo, estis *nur nerekte* tuŝata de la spertado fare de la animalo, ĉar la impresa kaj longe, ripete sentata spertado en la animala animo kapablas kvazaŭ impregni la unuopajn praesto-elementojn, tiel ke en ilia sekva manifestiĝonta kombinaĵo povas trovi esprimon tio, kion ili ricevis en la antaŭa.

La afero estas la sama ĉe la *homo* de tiu ĉi tero, laŭ tio, kiom li estas animala vivo, animala formo kaj animala animo!

Se oni parolas pri tio, ke la animo povas „suferi damaĝon“, kaj per tio celas la nepereontan, eternan animon, tiu vorto estu komprenata nur en *metafora* senco, ĉar en realo la eterna animo povas esti nek damaĝata nek mortigata per io surtera.

Sed ĝi ja povas perdiĝi *al la tera homo*, – kiel la tera homo al ĝi, – tiel ke formortas en li tio, kio iam ricevis *spiritan vivon en la tempo* el la fortoj de lia animo.

Kio koncernas la *animalan animon* de la tera homo, ĝi certe povas prezenti al la eterna, nepereonta animo memorojn, kiujn la eterna animo volas konservi en si eĉ tiam, kiam la impulsoj, kiuj enstampis ilin en ĝi, jam de longe forkonsumiĝis.

Tiel la *unueco de konscio* inter la homo vivinta surtere kaj lia *nepereonta animo* estas konservita eterne.

Sed kun ne malpli da efikeco, la eterna animo povas ankaŭ esti ŝarĝata el la animala animo nur per aferoj *mal-konformaj* al ĝi, kiuj *ekskludas* dum nemezureblaj tempospacoj ĉiun unuiĝon de la iama surtera konscio kun tiu eterna, – aŭ *malebligas* tiun unuiĝon por ĉiam ...

La tera homo vere ne bezonas zorgi pri tio, kion lia *eterna animo* havas por doni al li.

Sed dum sia fizika vivo li povas apenaŭ sufiĉe zorge atenti, ke lia *animala animo* prezentu tion, kion lia nepereonta animo povas enpreni *en la daŭron!*

Pri nomo kaj provizoraĵo

Kiam oni uzas la vorton „animo“ por la nur portempe okazanta kaj nur portempe perceptebla funkcia rezulto de la surtera, animalkorpa vivo, parolante pri la „animala animo“, kaj ankaŭ por tio eterna nekaptebla en la fizika mondo, kio estas la nepereonta mondo de eksterigo de la individuigita eterna spirita fajrero, tiam ĉi tiu samnomeco estas plene rajtigita.

Kvankam la *animala animo* estas nur *nerekta* rezulto de la aktivado de eternaj praesto-elementoj sur plej malluma ŝtupo de *impulsoj kaj instinktoj*, kaj la miriadoj de tiuj elementoj partoprenantaj en la vivo de organismo ne havas propran konscion pri si mem, dum la *nepereonta* animo estigas sian formon el miriadoj de *plene konsciaj, en la pralumo eklumantaj* praesto-elementoj de la home sentebla *plej alta* ŝtupo, kaj sekve prezentas *rektan* manifestiĝon de tiuj altaj praesto-elementoj, – tamen la du estas treege similaj rilate la *formon*, en kiu ili estas *sentataj*.

La egaleco de nomo do estas nenio alia ol karakterizaĵo de tiu ĉi sentada formo komuna al ambaŭ. El la nura fakto, ke la samnomeco de ambaŭ regionoj de spertado kaj sentado esprimiĝas en ĉiu lingvo per alia vorto, rezultas, ke la nomo „animo“ ne estas laŭsona prezento ligita al difinita sekvo de literoj, sed estas nomo por *io reale ekzistanta* kaj nevidebla al fizikaj okuloj.

Kontraŭe, la difino de la tera homo kiel videbla, pasema korpo kaj senmorta animo estas nur *provizoraĵo*, al kiu la ter-

ligita homo rifuĝis, kiam li estis konsciiĝinta pri tio, ke ankorau io alia ol tio korpece videbla aktivas en lia ekzistado.

Tiu provizoraĵo sufiĉis en tempoj de naiva akceptado de primitivaj eksplikoj pri ĉio, kion oni perceptis, – sed ĝi *ne plu* sufiĉas, post kiam la tera homo ekhavis la bezonon kritike kompari siajn observojn.

La plua konservado de tiu provizoraĵo devis do pli kaj pli malfortigi la kapablon senti la *nepereontan* animon, post kiam per kritika observado oni estis akirinta pli kaj pli da scio pri la *animala animo* kaj devis malkovri, ke tie ĉi temas pri nenio alia ol tempa funkcia rezulto de la vivo vivata el pasemaj teraj fortoj, kvankam multe supera al tiu de la animalo.

Ju pli la kapablo senti koncentriĝis sur la *animala animo*, portempe ja reale ekzistanta, sed iam subfalonta al diseriĝo, des malpli ĝi povis senti ankaŭ la *nepereontan* animon, indiferente, ĉu oni rigardis – ne tute senprave – tion sentatan kiel pruvon de tio, ke ĉiu observita „anima“ eksterigo estas atribuenda *sole* al la fizika korpo, aŭ ĉu oni – en kontraŭa maniero – interpretis ĉion, kio *reale* estas kaŭzata nur de la *animala animo*, kiel manifestiĝon de la *eterna animo*.

Ambaŭ eraroj povas esti superataj nur tiam, se oni scias, ke ĉe ĉio „anima“ en la tera homo temas pri du sferoj de vivo klare distingeblaj, sed similaj laŭ iliaj sentadaj eksterigoj.

Al persono ne plene konscia en tio spirita estas praktike neatingebla la kapablo eltrovi en ĉiu unuopa okazo, kio je animaj eksterigoj originas el la *animala animo*, kaj kio tute certe premisas la ekziston de la *nepereonta*, eterna, senmorta animo.

Ambaŭ estas tro multe interplektitaj, kvankam ekzistas signifa distingilo: ĉio, kio estas sentata kaj spertata en la ani-

mala animo, ankaŭ atingas la konscion de la *eterna* animo, kaj eĉ estas *konservata en ĝi*, – dum estas necese zorge eduki la animalan animon kun persista memdonemo dum jaroj, se ĝi akiru nur *la certecon pri la ekzisto* de la nepereonta animo.

Sed tio ne malhelpas, ke la animala animo de l' homo konstante ricevas influojn el la nepereonta animo, sen konsciiĝi pri la origino kaj naturo de tiuj influoj. Al ili la tera homa ŝuldas, ke lia animala animo kapablas leviĝi al nemezurebla alto super la animo de la nuraj animaloj de tiu ĉi tero, – kiel povas okazi ekzemple en la kampoj de *la liberalaj artoj*, – kvankam restas tamen eble, ke homoj atingas apenaŭ tiun alton de disvolviĝo de ilia animala animo, kiun oni multfoje trovas jam en altaj animaloj.

Kion oni mem konkludu

Se oni ankoraŭ hodiaŭ – post ĉio, kion mi sciigis el la eterna spirito pri tiuj ĉi aferoj – povas serioze demandi, *kio* do en la forpasintoj estas *kapabla sperti* post la morto de la tera korpo, tiel ke tio ĉi transvivanta povas ekpreni, sed ankaŭ rifuzi la manojn de altaj helpantoj kaj kateni sin por nemezureble longa tempo en la memkreitaj „bordaj regnoj“, – tiam mi devas kontraŭdemandi, ĉu la leganto, kiu malgraŭ ĉio, kion li legis en miaj instruaj libroj, tamen ankoraŭ eksentis tiom malmulte, eble estas nur mekanika legomaŝino, ĉar dum la legado de miaj vortoj li laŭŝajne sentis tiom malmulte, kiel gramofono sentas pri la enhavo de la diskoj, kies gravurojn sekvas ĝia nadlo.

Mi certe scias, ke mi estas devigita krei esprimon al multo, kiu apenaŭ povas esti *transmetata* el la realo *en vortojn*, kaj mi vere ne estas sufiĉe aroganta por supozi, ke mi trovis por ĉio la plej perfektan manieron de prezentado, – sed estas al mi ekster ĉia diskuto la ebleco, tre multfoje pruvita en praktiko, veni de miaj vortoj per simpla logika konkludo al la ĝusta respondo por ĉiu demando, kiu eble povus trudiĝi sen esti jam eksplicite kaj aparte respondita de mi.

Ankaŭ la ĉi supre indikita demando vere ne postulas apartan sagacecon por respondi ĝin, kaj krome estis sufiĉe ofte respondata de mi per ĉio, kion mi havis por diri pri la ekzistado de konscio kaj volo post la morto de l' korpo.

Ke *ne* estas la terhoma *animala animo*, kiu transvivas la korpan morton, montriĝas sufiĉe klare el mia sciigo, ke tiu animala animo estas nur funkcia rezulto de la vivofenomenoj de *la fizika korpo*, do ĉesas ekzisti je la morto de l' korpo.

Povas pluekzisti dum certa tempo nur formaĵoj, kiujn oni nomas „sozio“ aŭ „perispirito“.

Tiuj formaĵoj estas ombroj, kiujn *la impulso al formado de propra bildo* estigis el la eroj de la animala animo, kiam tiu ĉi ankoraŭ ekzistis kaj aktivis, kaj kiuj povas, kiel rezulto de tiu aktivado, transdaŭri la dissolviĝon de la animala animo *same longe*, kiel la aliaj teraj efikoj de la impulsoj ekigitaj de la animala animo. Granda nombro da impulsoj tiuspecaj post-restas en la tera sfero kiel sekvo de ĉiu finiĝinta tera vivo.

Tiuj ombroj estas aktive efikantaj memoraj bildoj kaj povas – dum ili ankoraŭ ekzistas – kaŭzi fantom-aperaĵojn kaj petolaĵojn, sed ili havas plu absolute nenion komunan kun siaj produktintoj.

Kio post la morto de l' korpo kapablas esti portanto de la terhoma *individua konscio*, antaŭe estinta konscia pri si mem en la animala animo, tio estas sole nur la nepereonta, eterna animo, kiu ankoraŭ konservas en si ĉiom de la sentomemoro, kiun ĝi *ricevis* el la homa animala animo, kun kiu ĝi estis ligita dum la korpa vivo.

En ĝi sola pluvivas la *volo* kaj la terece kondiĉata *sento-kapablo*, kiun la tera homo iam trovis en sia *animala animo*.

Certe, tiu ĉi stato signifas por la eterna animo ligitecon, el kiu ĝi volas liberiĝi, ju pli frue, des pli bone. Sed aliaflanke tiu ĉi „vivo post la morto“, kiu devas esti travivata ĝis la definitiva liberiĝo de la nepereonta animo, ankoraŭ apartenas en sia tuteco al la *surtera vivo!*

Ĝi prezentas nur tiun parton de la surtera homa vivo, kiu devas esti spertata sen animaleca videbla korpo kaj do *sen animala animo*.

Nur kiam ankaŭ *tiu ĉi* formo de surtera spertado estas definitive ĝisfine vivita, per konsumado de la impulso-pelitaj fortoj kreitaj dum la fizikkorpa vivo helpe de la animala animo, – la individua nepereonta animo, formita de la eternaj animeroj dum la terkorpa ekzistado helpe de la sentada resonanco de la animala korpo, fariĝas plene libera konservi tion el la tera memoro, kion ĝi *volas* konservi, kaj dissolvi tion, kion ĝi *ne* sentas inda je eterna konservado.

Kio apartenas al tiu ĉi temo, tion mi krome kaj aldone metis en plej simplan formon sur la lastaj paĝoj de la malgranda volumo de versaĵoj „Vivo en lumo“, kaj se mi samloke parolis en du diferencaj bildoj pri la „*animo*“, oni nun komprenos, ke mi parolas pri tio, kion la animala animo povas komuniki al la nepereonta animo kiel ĉeestantajn memorojn.

La *eterna* animo vere *ne* povas fariĝi „stablo“ aŭ putranta „marĉa lageto“, por tiam malkomponiĝi en si mem.

Rezulte de la interligiĝo kun animala animo dum la surtera vivo, ĝi estas devigita enpreni el la animala animo ankaŭ sentoimpresojn, kiuj bedaŭrinde kelkfoje elvokas multe pli drastajn komparojn ol tiujn elektitajn de mi por ilustrado ...

Ekzistas „organizaĵoj de bestoprotektantoj“, kiuj celas preventi nenecesan suferadon de animaloj, kaj tiu ĉi strebado estas inda je ĉia subteno.

Sed ne malpli la homo direktu sian atenton sur la protektadon de sia propra *nepereonta animo*, kiun li povas gardi

kontraŭ nedireble peza ŝarĝo, kiun li mem devos porti, post kiam lia korpa vivo estingiĝis. –

Pri granda subtaksado

Eĉ se anoj de honorinde maljunaj religiosistemoj, al kiuj la tera homo ŝajnas „konsisti“ nur el mortema korpo kaj senmorta animo, eble pretas koncedi, ke *io anima* egala al tio de la *animalo* efektiviĝas en iliaj memeksterigoj dum la surtera vivo, oni tamen povas atendi kun plena certeco, ke tiuj koncedantoj asignas al tiu efektiviĝo supran limon, kiu – en realo – inkludas apenaŭ la *plej suban* zonon de tiu efektiviĝo.

Ĉion pli altan ili jam alkalkulas al sia *eterna* animo, firme opiniante, ke nur io nesignifa malalta povas esti esprimo de portempa vivokomplekso, kiu mem reale prezentas nur funkciorezulton de pasema tera korpovivo.

Certagrade tiu opinio estas subtenata de tio, ke, kiel jam menciite, la animala animo en la tera homo ricevas el la *eterna* animo treege gravajn influojn, kiuj alkondukas ĝin al io kelkrilate senkompare pli alta ol tio normale konforma al ĝi. Influojn, kiuj neniam povus doniĝi al animaloj!

Tial fariĝis malfacile, determini kun certeco, kio estas ankoraŭ atribuenda al la terhoma animala animo, kaj kio estas sendube efiko de la *nepereonta* animo.

Sed malgraŭ ĉio oni povas ĉiutempe esti certa, ke la supra lima linio por tio, kio originas el la pasema, animaleca animo de la terligita homo, povas esti tirata *ne sufiĉe alte!* –

La ermitaj monaĥoj de la monto Atos siamaniere nerefuteble pravas profundan ekkonon, se ili deklaras, ke ĉiuj specoj de eruditeco estas *neakordigebla* kun vera pieco kaj malhelpas la ekkonon de Dio.

Sed por ĝuste kompreni tion, oni devas scii, ke por tiuj asketaj anakoretoj tute ne temas pri la ĉie konataj diverĝoj inter kredo kaj scio, sed pri *eruditeco ĝenerale*, eĉ se ĝi rilatas al „ortodoksa“ teologio aŭ skriboj sekurigita kontraŭ ĉia religia dubo.

Laŭ ilia ekkono, ili – kvankam rezulte de troigita konkludado – taksas analfabeton vivantan tute por sia eterna animo multe pli alte ol homon, kiu profunde konas ĉiujn problemojn de ortodoksa teologio solveblajn per la intelekto. Ĉar ili bone scias, ke ankaŭ ties intelekto ŝuldas multegon al la influoj de la eterna animo, sed ke lia erudicia esplorado *apenaŭ bezonas la eternan animon* ...

Eble iu aŭ alia leganto de tiuj vortoj ektimos, kiam li rimarkas, ke li, netuŝite de iaj duboj, kutimis bonafide atribui al sia nepereonta animo tion, kion li nun – se li volas esti honesta antaŭ si mem – devas dankante atribui al sia pasema teranimala animo.

Sed estas pli bone trapasi unufoje tian ektimon, ol daŭre memkontente revii revojn, kiuj tute ne konformas al la realo kaj tial ne kapablas progresigi ion realan en la revkatenita homo.

Certe ne estas necese doni sin, kiel la plej rigoraj ermitoj inter la monaĥoj de Atos, nur al la sentado de la eterna animo kaj suspekti en ĉio, kio povas esti proksimigata al la konscio per la pasema animala animo, kvazaŭ „maŝojn de la infero“.

Estas eĉ oportune, renkonti la animalan animon kun ĉia respekto, kaj tute ne malestimu tion, kion ĝi havas por peri al la tera homo.

Sed estas aspirinde, ke la animala animo estu plene submetata al la servo de la eterna animo, ĉar en tia servo ĝi po-

vas progresigi la laboron de la eterna animo en apenaŭ imagebla maniero.

Kvankam la animala animo ne estas, kiel la *nepereonta* animo, la pri si mem konscia spaco de spertado de individui-gita eterna spirita fajrero, – ne malkaŝiĝante kiel sentebla formaĵo el plej altaj, *lumricevemaj* praesto-elementoj, – ĝi tamen estas *sekundara* efiko de la praesto, sed en sia memmanifestiĝo *plej malproksima de la lumo* kaj nur blinde *kreema*; memmanifestiĝo el kiu eliris kaj eliras ĉio formita en la universo.

Tie ĉi solena respekto estas vere konsilinda, kaj ĉiu sub-taksado devos kaŭzi nedeziritajn sekvojn!

Homo, kiu kredas je eterna animo aŭ laŭ sia opinio jam sentas ĝin, certe ne volonte aŭdas, ke eĉ *la plej altaj* rezultoj de homa *pensado* – indiferente, ĉu tiu pensado rilatas al tio, kion oni kutimas nomi „filozofio“, al religio, matematiko aŭ iuj kampoj de plej alte disvolviĝinta tekniko inkluzive de la kemio kaj ĉia medicina esplorado – povas realiĝi *sen la plej malgranda kunagado de la eterna animo*.

Eĉ pli malfacile li komprenos, ke ankaŭ teknike tre signifaj verkoj de ĉia arto estas nur la laboraĵo de la *animala animo* atingita en la homo la nivelon de plej alta disvolviĝo, kvankam ili povas *fariĝi*, sur ĉiu teknika alteco, *esprimoj de la nepereonta animo*...

Apenaŭ iu alia vorto estas tiom ofte misuzata kiel la vorto „animo“. Ĉar pretas akcepti ĝin kiel esprimon por io superordigita al la animalo ĉiu homo, kiu plej energie rezistus, se oni atendus de li, ke li *superordigu* la *eternan* animon kiel *realon* al sia elpensita mondkoncepto.

Pri la dilemo de animzorgantoj

De tempo al tempo atingas min leteroj de tre impresaj konantoj de miaj libroj, kiuj opinias, ke ili devas esprimi sian indignon pri iuj neestimaj, malsaĝaj aŭ kategorie rifuzaj eldiroj de al ili konataj profesiaj religioreprezentantoj pri miaj skribaĵoj.

Oni sendas al mi tiujn komunikojn opiniante, ke mi tre deziras scii pri tio, por ke mi povu defendi min, private aŭ publike, kontraŭ tiaj eldiroj.

Sed tiu opinio originas el optimismo, en kiu mi ne povas partopreni.

Oni ne klarigas al si, ke la gvidanto de religia komunumo, – indiferece, kia historia titolo eble decas al li aŭ ĉu la komunumo eble preferas nomi sin „eklezio“ kaj kredas, ke ĝi posedas spiritan potencon donitan de dio, – ĉiuokaze estas *oficisto* de la komunumo kaj kiel tia devas gardi ties interesojn.

Sed neniu eklezia oficisto kaj neniu erudiciulo preta servi la interesojn de religia komunumo havas la devon, legi miajn skribaĵojn atenteme pro sia propra savo.

Se ili eble tamen, sekve de iu ajn neantaŭvidita cirkonstanco, venas antaŭ liaj okuloj, oni certe ne povas riproĉi lin, se li rigardas ilin kun antaŭjuĝa suspekto.

Ju pli partie, timeme kaj tial supraĵe li rigardas ilian enhavon, des pli certe li kredos, ke tiu ĉi enhavo minacas la interesojn de la komunumo, kiu donas al li oficon, dignon, titolon kaj prizorgadon de bezonoj, kaj kiu finfine ankaŭ repre-

zentas kredinstruon, kiu laŭ lia konvinko alportas al ties kredantoj la eternan savon de la animo.

Ne estas mirige, ke li volas gardi la kredantojn konfidentajn al li kontraŭ sciigojn, kiuj kelkloke sonas alie ol la *teksto* de la instruoj, kiujn li havas por doni al ili.

Tia komunumestro, aŭ tia teologo konfesie ligita, devus esti ekstreme vastevida kaj treege juĝokapabla reprezentanto de sia profesio, se li post legado de kelkaj el miaj skriboj ekkonus, pri kio temas, kaj ke la disvastigado kaj konfirmado de tio kredata de li kaj de tio liakonvinke ĝusta ne povus trovi pli potencon helpon ol estas prezentata en la enhavo de tiuj skriboj.

Sed preskaŭ ĉiuj ĉi animzorgantoj, kiujn mi tute ne subtakŝas, estas interne nedisigeble ligitaj al la *teksta formo* de la instruoj kredataj de ili, kaj ne malpli al la *interpreto* de la vortoj, kiu estas rigardata kiel klasika teologia doktrino.

Kiel mi povus supozi, vidalvide al tia certeco de rifuza opinio, ke estas bezonata nur klariga informado aŭ, eble, nerifutebla ĝustigado, por alkonduki la liberigon de tia katenito?

Preskaŭ neniu el la koncernaj personoj supektas, ke li disvastigas, apud tio nerifuteble *vera*, ankaŭ iom danĝerajn *erarojn*.

Sed aliaflanke tute ne povus ekesti en mi la intenco „resti prava“, ĉar tio, kion mi komunikas, ne estas elmetita al iu tera juĝado.

Mi donas el *tio eterna* sciigon, kiun povas doni nur iu, kiu en sia spirita esto estas *pra-funde hejma en tio eterna*.

Sed koncerne la insultitaj klerikoj, de kiuj oni tre naive atendas, ke ili ĝoje ekkonu tion prezentitan al ili en miaj skri-

boj, oni forgesas, ke temas pri *teraj homoj* kaj ke la „spirito“, al kiu ili donis sin, estas *cerba spirito*, eĉ se ĝi okupiĝas pri religiaj problemoj.

Kiel oni povas atendi de servantoj de la cerba spirito, ke ili kapablas ekkoni tion, kio originas el la *eterna spirito*?!

Sed estas vere malproksima de mi la intenco fari al la klerikoj de la oficialaj konfesioj eĉ la plej mildan riproĉon.

La tuta spirita edukado de tiuj viroj estis tia, ke ne povis veni al ili eĉ la plej malgranda dubo pri ilia ligiteco kun la spirito.

Kiel ili povus nun, post la legado de la skriboj de „laiko“, trovi sin konvinkitaj, ke ili ĝis nun estis viktimoj de mem-trompiĝo?

Krome, mi ne povas respondecigi la *rilaton* de animzorgantoj *kiel dungitoj* de kredkomunumo por la necedema memteno kontraŭ mia instrua verko.

Kvankam ilia devo instrui estas klare difinita, tamen tute ne ekzistas la strikta, malmola kateniteco de propraj opinioj, kiun persono ne konanta ekleziajn aferojn permesas al si firme supozi.

Sed ekzistas ankaŭ inter ekleziaj instruaj oficistoj la samaj orgojlo kaj aroganteco, kiuj okaze troviĝas en ĉiu alia ofici-staro.

Kvankam en la fluo de mia vivo mi venis en home proksiman kontakton kun multaj klerikoj de la religiaj komunumoj troveblaj en Eŭropo, mi renkontis tian fariseismon nur *tre rare*.

Sed mi preskaŭ ĉiam trovis plej sinceran memdonemon al la alprenita respondeco pri la savo de la konfeditaj animoj kaj konsiderindan socialan helpemon, tiel ke mi tre aprezas la vi-

voverkon de la koncernaj viroj, indifere, ĉu ili sentas simpatian al miaj sciigoj el tio eterna aŭ, miskomprenante, opinias ke ili, pro sia premanta respondeco, devas averti kontraŭ ili.

Krome, oni tre eraras, se oni opinias, ke oni povas komprenante renkonti la emanaĵon de tio eterna, – emanaĵo, kiu prezentiĝas en mia nura ekzisto kaj samtempe en la instruaj vortoj formitaj de mi kiel tera homo, – dum oni ankoraŭ eĉ ne komprenas, ke mi povus *kontesti* al *iu* vera religioformo, kiun mi trovas surtere, *ĝian rajton pri ekzistado*.

Aliaflanke, oni estu konscia pri la fakto, ke la eternaj spiritalaj potencoj *neniam* uzis la oficialajn estrojn de ekzistantaj religikomunumoj, kiam la diversaj partoj de la tera homaro devis ricevi novan enrigardon en tion eternan *el tio eterna*.

La mondreligioj hodiaŭ ampleksantaj multajn milionojn da kredantoj senescepte ricevis la unuan impulson por ilia estiĝo per „eksteruloj“.

El la rondoj de oficialaj pastroj, predikantoj kaj animzorgantoj ĉiam eliris plejfavoraokaze nur „reformantoj“. –

Kion mi donis en mia surtera instrua verko *el tio eterna* kaj postlasas al homoj venantaj post mi, tio ne celas estigi religiajn reformojn nek konduki al la formiĝo de novaj religioj!

Sed kiam oni tie, kie estas necese, anime ekprenis ĝin, tiam ĝi elmontras la kaŝitan plejinternan veron de ĉiuj religioj stimilitaj el tio eterna, same kiel la necesecon de iliaj diversaj, el tio eterna volitaj formoj, al kiuj la teraj fondintoj kreis la terhoman esprimon.

Kiel tio eterna estas al si mem „natura“

En ne malmultaj el la nepetitaj leteroj ricevitaj de mi ekde la apero de mia unua publikaĵo, mi devis rimarki ĝis tediĝo, ke oni imagas al si tempan interpretanton de tio eterna sur tiu ĉi tero tute alia ol li tie ĉi reale estas *spirite ebla*.

Tro multaj imagoj el antikva romantikismo hantas la kapojn, kaj dum jarmiloj aŭ almenaŭ jarcentoj tro multa false ora brilaĵo ĉirkaŭas la homajn figurojn, kiuj kapablis esti al siaj teraj kunhomoj gvidantoj en la regnon de l' eterna substanca spirito, ol ke oni, eĉ ankoraŭ hodiaŭ, estus preta facile rezigni tion ekŝatitan pro *tio reala*, kio ĉiutempe estis multe pli simpla kaj pli terkolora, ol fantaziemo kaj ekscitita bezono de fabelanta ornamado volis akcepti.

Eĉ al tiuj, por kiuj solaj miaj libroj estas skribitaj, kaj kiuj per miaj vortoj atingis vivon kaj lumon, ofte pro iliaj feliĉiĝo kaj dankemeco estas sufiĉe malfacile, simple rigardi min kiel *homon* inter homoj, kaj ili ne konsideras, ke io *vere eterna* povas malkaŝi sin nur en io *vere natura*, ĉar kiel io eterna ĝi estas *al si mem* „natura“.

En ĉiuj tempoj la granda gesto kaj la bezono de aŭreolo estas la plej certa signo por tio, kio je la homo estas *neaŭtentika* en si mem, ĉar tio aŭtentika vivas ne el la impreso, kiun ĝi faras sur aliulojn, sed el sia propra aŭtentikeco.

La romantika legendoformiĝo, kiu ĉiam kaj ĉie sukcesis enradikiĝi kaj suprenvolviĝi, kie homo vivis surtere, kiu devis alporti al siaj kunhomoj certecon pri tio, kio reale estas

„eterna“ en ili, vere ĉie montras sennombrajn spurojn kaj cikatrojn de malsaĝa pritrancado. Sed tia legendoformiĝo tamen havis sian altan valoron, ĉar ĝi prezentis protekton por ne malmultajn atestojn el la eterno, kiuj *sen* tiu ĉirkaŭvolvaĵo estus tute malaperinta el la konataĵo de la homaro.

Malpli danki oni devas al la patosaj aŭ ekscese lirikaj *biografoj* de la homoj parolantaj el tio sia propra eterna, aŭ sciiĝantoj inspiritaj el la eterno sur iu spirita vojo, kies instruoj estas ankoraŭ relative bone konservita sub tiu aŭ alia legenda ĉirkaŭkreskaĵo. Ĉar al tiuj biografoj oni vere devas atribui la bildojn, per kiuj simplaj kaj naturaj viroj, kies memkonscio estis heligita el la eterno, estis misprezentataj kiel fantaste nenaturaj, neveraj figuroj, pro tio, ke la priskribantoj ne povis regi sian abundan fantazion, kaj sciis nek pri la fora sekreto de tio nature simpla homa, nek pri la tera proksimeco de tio dia. —

Por ĉiu unuopa kredanto, kiun troa fervoro iam sukcesis gajni el naive senkritika amaso per kontraŭnaturaj troigoj kaj fantastaj aldonoj, hodiaŭ miloj da homoj devas oferi sian kredon, ĝis oni lernas distingi inter tio, kio estis viva realo, kaj tio, kion ekzaltita prozelitismo pensis devi formi el ĝi.

El mia tera sangoheredaĵo mi vere ne havas sufiĉan dispozicion por blasfemio, por voli esti „*komparata*“, eĉ nur el plej fora foreco, kun iu el la tie ĉi karakterizitaj figuroj misdesegnitaj ĝis nenatura mezuro, kaj oni certe ne suspektas, kiom malmulte mi ŝatas esprimojn de honorado, kiuj en bonvola ekscentreco estas stampe aplikataj al mi, sed tro klare malkaŝas sian originon el stampejoj, kies „oro“ abundas je verdigro! Sed kie temas pri *vera* oro, tie la stampo montras al mi en ĉiu unuopa okazo ĉiam la bildon de homo *ligita* al Dio,

homo *unuigita* kun Dio, aŭ homo arde *sentanta* Dion en si, bildon, kiun mi respektas tro multe, ol ke mi povus permesi, ke oni tuŝu ĝiajn naturajn trajtojn por enkonduki „similecon“, kiu trovas konfirmon nek per mi, nek per tiu iam prezentita en ĝi.

Plie, en *tio eterna* ekzistas *nenia samformeco* kaj *nenia ripeto!* Ĉiam ĝi aperis en *unika* formo en homo de tiu ĉi tero, kaj neniam ĝi *kopius sin mem*.

Krome, io eterna estas en si mem *sublime fora* de ĉia honorado, kaj kie ajn homoj kredis, ke ili „honoris“ manifestajon de tio Dia en unu el iliaj kunhomoj, tie ili vere honoris nur *sin mem* kaj sian propran homecon, kiu en unuopuloj de tempo al tempo *kapablas* porti en si ion eternan kaj esti konscia pri ĝi.

Ekzemple, *senhumura* homo certe *neniam* estas proksima al Dio, eĉ se li aperas al sia ĉirkaŭantaro kiel plej pura malkaŝanto de tio Dia.

Feliĉa humuro tro multe estas esenca parto de la memdeterminiteco de tio eterna, ol ke ĝi povus malkaŝi sin en tera homo kiu estas dekomence „malsukcesinto“, ĉar pro sia inklino al tristeco kaj melankolio li ne kapablas en sia interno ekoni la dian ridadon. – (Tiu ĉi parto de tio eterna havas nenion komunan kun sprito kaj moko, kiom ajn multe sprito kaj moko povas eksciti la korpan ridemon.)

Se do oni opinias, ke homo povanta sciigi pri Dio devas treme persisti en eterna seriozeco, oni simple eraras. Estas tre utile lerni ekoni en si tiun eraron kiel tian. Wilhelm Busch*, *malgraŭ* sia inklino al malica ĝojo, vere estis pli proksima al tio eterna ol la Tebaida ermito premita de tentiĝoj, kiun li pri-

mokis ...**

Krome, ĉiu *aŭtentika* sciiganto pri Dio portas la stampon de sia tempo, – parolis en ĝia lingvo, portis ĝiajn zorgojn, vestis sin en la maniero de sia lando, manĝis kaj trinkis kun ĉiuj tion, kio estis kutima tie, sen timi fari pekon, kiam li spertis en sia tera korpo fortan korpan sentadon.

Ĉio, kio en antikvaj sciigoj sonas *diference*, estas aldonaĵo de entuziasmoj, kiuj tiumaniere celis krei al la objekto de sia honorado, kiu estis malproksima de ilia komprenado, la aŭreolon de io *supernatura*, ĉar ili sciis nenion pri la *natureco* de tio dia.

Ili ne suspektis, ke tio, kio laŭ ilia opinio estis io „supernatura“, estis nur la invento kaj preteksto de ilia propra *natureco*, ĉar ankaŭ tio *super-tera* estas ekkaptebla nur al la *natureco*!

Tial do oni lernu kompreni, ke mi ja devas premisi ion ekster-ordinaran kaj paroli pri io *super-tereca*, sed ke tio eterna, el kiu mi donas sciigon per tio mia tera, estas tio mia *plej natura*!

Ankaŭ miaj kunhomoj, kiam ili laŭkutime parolas pri io „supernatura“, finfine vere celas tion *super-teran*, kio estas al mi *natura* vivospaco, *same* kiel tio tera, kion mi neniel neas kaj kio estas amata de tio eterna.

Mi certe scias, ke la konscio-situacio, kiu estiĝis al mi el tio praetera: – en la *eterna pralumo*, en la *eterna spirita homo*, kaj en la *tempe pasema terhomeco* ligita al animalo, –

*) Germana aŭtoro de humuraj bildrakontoj kaj poemoj (1832–1908)

**) Pri la konfuzo, fare de Busch, de tiu ermito kun la sanktulo de Padova, vidu: „Leteroj al unu kaj multaj“.

aperas al miaj kunhomoj tie ĉi sur la tero kiel io stranga, ĉar tia situacio estas nekonata al ili en la propra konscio, kaj ĉar ili ekde antaŭ jarmiloj celis konvinki sin reciproke, ke nur io „supernatura“ povas havi la kapablon vivi konsciamaniere samtempe en tio tera kaj en tio eterna.

Al mi mem tute ne estis faciligate, fare de tio mia tera, kompreni per mia penskapablo tiun mian pradonitan konsciosituacion, kaj eĉ nuntempe ne pasas iu tago, en kiu mi en tio mia tera ne spertas *ion aldonan* el tio eterna.

Malmola, sed necesa malfaciligado konsistis en tio, ke mi dejunece devis superi denaskan, ekstreme aktivan memkritikemon kaj inklinton al senindulga skeptikeco, inklino kiu peze premis min jam en la infana kredo donita al mi per edukado.

Pli malfrue aldoniĝis, – sed tiam kvazaŭ liberiĝo, – la enrigardo en ĉiujn tere bazitajn procezojn nomitajn „psikaj“ en ĝenerala scienca lingvouzo, kiuj povas konduki al eraraj interpretoj en la cerba konscio kaj kiuj kapablas ekkateni eĉ tiujn personojn, kiuj akiris meriton pri la elmontrado de tiu kaŝita okazado.

Mi do vere laŭsperte estas kapabla plene kompreni ĉian konduton kontraŭ miaj sciigoj kaj ĉiun eraran juĝon pri mi mem.

Sed ĝuste tial mi – *en tio eterna* – *ne estas fremdulo* eĉ al la plej rifuzema inter miaj teraj kunhomoj! Eble mi estas multe pli proksima al li, ol lia tera konscio suspektas. –

Sed la „natureco“ de tio eterna tute ne havas la saman signifon kiel *senformeco*, kaj ĉiu, al kiu estas indiferente, ĉu li, kie ajn, observas aŭ lezas la formon, devas klarigi al si, ke li per tio *izolas* sin de ĉio vere eterna, kio sur ĉiuj vojoj *volas*

formon kaj malkaŝas sin nur al tiuj en ilia plejinterno, kiuj en sia plejinterno kaj en tio ekstera celas *formi* sin en vazon de tio dia.

Fino kaj adiaŭo

Per tiu ĉi libro mia tempa instrua verkaro estas *finita!*

Baldaŭ post la komenco de la dudeka jarcento laŭ la kristana tempokalkulo, mi ekklopodis vortigi la unuajn ekkononjn el tio mia eterna, kiuj tiutempe estis alpropriĝintaj al mia cerba konscio.

Tio, kion mi tiam estis notinta, longe restis netuŝita, ĉar mi tiutempe tute ne intencis mem publikigi ĝin dum mia vivotempo.

Nur en la jaroj 1912 kaj 1913 estiĝis la unuaj el la nun ekzistantaj skriboj, en diversaj lokoj de Grekio, kaŭze de aparta ekstera kaj interna spertado, pri kiu mi raportas kelkloke en mia verkaro. Sed jam en 1910 mi estis konvinkiĝinta pri la neceso de mempublikigado dum mia tera vivo, kaj ekde tiam preparinta la verkadon de unuopaj partoj.

En 1913 mi sendis tian fragmenton, antaŭe ankoraŭ plurfoje de mi redaktitan, de Ateno al Germanio, kie ĝi estis presata.

Hodiaŭ, en la eventoplenaj tagoj de l' jaro 1936, mi finas mian skriban instruverkaron, kiu ampleksas *ĉion*, sed *ne pli ol tion*, kio post la lastaj vortoj de tiu ĉi libro – kiu formas la finon de la libroserio komenciĝanta per „La Libro de la Reĝa Arto“ – estos definitive indikata laŭnombro.

Nur la traktaĵoj pri *figura arto*, kiujn mi kunigis en la libro „La regno de la arto“, same kiel la malgranda biografia skribo „Koncerne min mem“ kaj la volumeto „El mia pentre-

jo“, kiu ankaŭ estas precipe biografia, kompreneble ne apartenas al mia spirita instruverkaro, kvankam ili montras ĝiajn spurojn. La samo aplikiĝas al la kolekto „Okultaj enigmoj“.

Ankaŭ unuope aperintaj traktaĵoj, kiujn mi mem ĝis nun ne enmetis en unu el miaj libroj, ne povas esti alkalkulataj al mia spirita instruverkaro nun finita, kvankam tiu apartigo tute ne signifas ilian postan senvalorigon fare de mi.

Sed *neniuokaze* estas permesate, ke iu ajn parto de privat-aj *leteroj*, kiun *ne mi mem* enmetis en libron de la serio da instrulibro, nun definitive finita de mi, estu iam rigardata kiel apartenanta al mia verkaro aŭ uzata por interpreti iun lokon en tiu ĉi verkaro! *Mi povas alpreni eternan respondecon por nenio alia, ol por la hodiaŭ ekzistanta enhavo de miaj sube indikitaj, publike aperintaj skriboj!*

Rilate al leteroj *ne publikigitaj de mi mem*, eĉ se ili tuŝas spiritajn aferojn, mi portas nur pure tempan, ĝenerale homan respondecon, kiu postulas de ĉiu eldiro nur, ke ĝi estu la esprimo de tio, kion homo en sia ĉiutaga vivo siaopinie devas diri en certa momento kaj nur por tiu momento.

Mi neniam skribis leterojn „por estontaj generacioj“, sed ĉiam lasis gvidi min per mia helpemo kontraŭ la koncerna adresato, eĉ se mi tute ne sciis, ĉu li estis inda je tiu memdonemo. Malfacile tolereblaj desapontoj vere ne mankis al mi!

Cetere, mi tute ne devontigas min aperigi plu neniun plian libron, indiferece kun kiu enhavo.

Sed mi jam nun energie rifuzas akcepti, ke iu skribo, kies aperon mi eble sentos necesa, esti alkalkulata al mia finita spirita instruverkaro!

Tiu finado originas ne el arbitro, sed el la postulo de *tio*, kio estas finata.

La serio da libroj, en kiu tiu ĉi instruverkaro nun definitive prezentigas, restos por ĉiu el miaj kunhomoj, kiu volas trovi ion alian ol *tion sian eternan*, „Hortus conclusus“: – ĝardeno strikte gardita, al li ĉirkaŭfermita, eĉ se la malvasta pordo formanta la alirejon de la ĝardeno estas larĝe malfermita antaŭ li.

Malproksima de mi estas la deziro, akirigi al nepetito aliron, kaj enkonduki tion, kio devas resti ekstere. Sed des pli volonte mi sendas miajn dezirojn de beno al ĉiuj, kiuj lasas tion sian teran tie, kie estas ĝia adekvata loko, kaj serĉas en mia instruverkaro nur tion sian *eternan*!

Mi ne donas *sistemigitan* instrukcion, sed *vivan* instruon! La tridek du unuopaj libroj, kiuj formas same multajn partojn de mia spirita instruverkaro, enhavas *ĉion*, kion la tera homo devas scii pri tio eterna kaj pri la rilatoj ligantaj lin mem kun tio eterna, se estas grave al li, trovi en si la alirejon al tio eterna, kaj iam fariĝi kapabla sperti tion eternan.

Granda estas la danĝero tiom algluiĝi al *la spertado de la pasemaj terecaj aferoj*, ke la kapablo sperti ion *eternan* povas *neniam* esti atingata.

Damaĝata de tio estas *ne tio eterna*, sed *la tera homo*, kiu nesuspektante perdas definitive kaj nerevenigeble tion, kio en li estas de eterna naturo.

Sennombraj tiaj disiĝoj de la terhoma konscio disde tio eterna, je kio la homo latente havas rajton, okazas tagon post tago, horon post horo.

Por ke estu savata *pli* ol la religioj hodiaŭ ankoraŭ *kapablas* savi, estiĝis mia skriba instruverkaro!

Mia „postvenonto“. – homo en la *sama* anima-spirita situacio kiel mi, kaj same kiel mi *destinita* esti surtere percept-

ebla voĉo de la eterna pravorto, – estos atendata de *tre multaj generacioj*, kaj aperos sur la tero, por plue montri la vojon de mi montrita, ne pli frue, ol kiam tio, kion mi diris en mia nun finita instruverkaro, fariĝis komuna anima kaj cerbokonscia posedaĵo de *ĉiuj* homoj de tiu ĉi tero strebantaj al tio eterna!

Oni ne ricevas la spiritan *vivon*, prezentatan en miaj vortoj, per *pripensado de la intelekto perceptebla enhavo* de la unuopaj tridek du instruaj partoj, cerbumante pri ĝi aŭ diskutante ĝin kun si mem aŭ kun aliuloj.

Sed oni akcepteme kaj sen iu cerbumemo lasu efiki ilin sur sin en la formo, kiun mi donis al ili, por ke oni lernu *ekkoni* kaj *senti* la vivon prezentatan en ili kaj baziĝantan en tio eterna.

Kiu perceptis tiun mian propran spiritan *vivon* en miaj vortoj, kaj tiam sentis kaj enprenis ĝin, tiu estas liberigita de ĉiu dubo, kiun la timo je eraraj konkludoj estigas en ĉiu homo, kiu misuzas sian teran penskapablon por konstrui al si vojojn el *pensorubo*, erare imagante, ke li povas sur ili atingi *la eternan realon*.

ENHAVO DE TIU ĈI LIBRO

Interparolo je la pordo.....	2
Pri la simpleco en ĉio eterna.....	6
Pri ŝanĝo de loko kaj pri „ŝtupoj“.....	10
Pri diversaj konscioniveloj kaj pri helpo al suferantoj.....	13
Pri la konscio de la forpasintoj.....	16
Pri la alta risko de helpanto.....	19
Pri la karikaturado de la eterna „mi“.....	23
Pliafoje pri vero kaj realo.....	28
Pri tempa kaj eterna spacoj.....	30
Pri aziaj religiaj tekstoj.....	33
Pri la mistero de l' Oriento.....	37
Pri la diversaj formoj de religio.....	41
Pri konsento kaj kredo.....	45
Pri eraraj bildoj de Dio.....	49
Pri la celo de ĉiu instruado.....	52
Kiurilate mi estas nur transdonanto.....	55
Al kiu mi havas nenion por diri.....	58
Pri la savo de la eterna animo.....	61
Pri la prokrastanta demandemo.....	64
Pri la tempa kaj eterna animoj.....	67
Kio restas post la morto.....	71
Pri nomo kaj provizoraĵo.....	74
Kion oni mem konkludu.....	77
Pri granda subtaksado.....	81
Pri la dilemo de animzorgantoj.....	84
Kiel tio eterna estas al si mem „natura“.....	88
Fino kaj adiaŭo.....	94
Definitiva listo de mia kompleta instruverkaro.....	99

DEFINITIVA LISTO DE MIA KOMPLETA INSTRUVERKARO

1

LA LIBRO DE LA REĜA ARTO

(*Lasta, reviziita kaj pligrandigita eldono.*)

La „Reĝa Arto“ tie ĉi celita estas la hinda *Raja Yoga*. Sed mi uzas la nomon por indiki *ion nemezureble pli altan.*)

La lumo de Himavat kaj la vortoj de la majstroj. La lumanto al la serĉanto. La rikolto. La infinitobla Unu. Ekkonu vin mem. Pri la spiritalaj majstroj. Danĝero de la vanteco. El la lando de la lumantoj. La sojlo. La demando de l' reĝo. La migrado. Paska nokto. Unuiĝo. La volo al ĝojo. Al ĉiuj strebantaj al la lumo. La instruo pri la volo al ĝojo. Epilogo.

2

LA LIBRO PRI LA VIVANTA DIO

(*Lasta, reviziita eldono*)

„La tabernaklo de Dio estas kun la homoj“. La „Blanka Loĝio“. Supersenseca spertado. La vojo. „En Sof“. Pri serĉado de Dio. Pri farado kaj agado. Pri sankteco kaj peko. La okulta mondo. La kaŝa templo. Karmo. Milito kaj paco. La unueco de la religioj. La volo al lumo. La altaj kapabloj de ekkono. Pri la morto. Pri la spirito. La pado de perfektigi. Pri la eterna vivo. En la oriento loĝas la lumo. Fido, talismano, kaj bildo de dio. La magio de l' vorto. Voko el Himavat. Danko.

3

LA LIBRO PRI LA TRANSA MONDO

Enkonduko. La arto de mortado. Pri la „templo de la eterneco“ kaj la mondo de la spirito. Tio sola reala. Kion oni faru?

4

LA LIBRO PRI LA HOMO

(Lasta, reviziita eldono)

Enkonduko. La mistero: „viro kaj virino“. La vojo de la virino. La vojo de la viro. La edzeco. La infano. La nova homaro. Epilogo. Fina instruo.

5

LA LIBRO PRI LA FELIĈO

La devo esti feliĉa. „Mi“ kaj „vi“. Amo. Riĉeco kaj malriĉeco. La mono. Optimismo. Epilogo.

6

LA VOJO AL DIO

Iluzio, kredo kaj fido. Scio certa. Songo de la animoj. Vero kaj realo. Jes kaj ne. La granda batalo. La perfekteco.

7

LA LIBRO DE LA AMO

(Lasta, reviziita eldono)

La plej granda amanto. Pri la prafajro de la amo. Sava lumo. La krea forto de la amo.

8

LA LIBRO DE LA KONSOLO

Pri sufero kaj konsolo. Pri la sufero. Pri diversaj malsaĝaĵoj. Pri la konsola forto de la laboro. Pri la konsolo de funebrantoj.

9

LA LIBRO DE INTERPAROLOJ

Konfeso. Scio kaj okazado. Lumo kaj ombro. La potenco de la spirito. La juvelo de la koro. Transiro. La interparolo pri la plej interna oriento. La interparolo pri la forpaso de perfektiginto. La floroĝardeno. La malbonaj disĉiploj. La nokto de provo. Individueco kaj personeco. La regno de la animo. Trovi sin mem. Pri la pli aĝaj fratoj de la homaro. Magio.

10

LA SEKRETO

Komenco. Interparolado ĉe la marbordo. La monaĥejo „Santo Spirito“. Suda nokto. Roka Insulo. Veturo surmara. Postparolo

11

LA SAĜECO DE JOHANO

Enkonduko. La bildo de l' majstro. La tera vojo de la lumanto. La finiĝo. La antikva mesaĝo. La pura instruo. La parakleto. Epilogo.

12

VOJMONTRILOJ

Promeso. Fenomeno kaj sperto. Ekkono kaj instruo. Lerni legi. Leteroj. Kulto al personoj. Kritikemo. Kiu estis Jakob Böhme? La potenco de sanigado. Danĝeroj de la mistiko. Dudek du instruaj poemoj.

13

LA FANTOMO DE LA LIBERECO

Fatamorgano. Neceseo. Komuneco. Aŭtoritato. Partio. Misa ekonomiumado. Konkurenco. Sloganoj. Mem prezentado. Religio. Scienco. Konscio pri la realo.

14

LA VOJO DE MIAJ DISĈIPLOJ

Kiun mi rigardas kiel mian disĉiplon. Necesa distingo. Nenecesa memturmentado. Neeviteblaj malfacilaĵoj. Dinamika fido. La plej granda obstaklo. La disĉiplo kaj liaj vojokunuloj. Interna vivo kaj ekstera mondo. Kiel miaj libroj estu uzataj.

15

LA MISTERO DE GOLGOTA

(Lasta, reviziita kaj pligrandigita eldono.)

La mistero de Golgota. La plej terura el niaj malamikoj. Amo kaj malamo. Kreskado de la animo. Spirita gvidado. Okultismaj ekzercoj. Mediumismo kaj arta kreado. Ĉe la fonto de vivo. La neebleco „fariĝi membro de la Blanka Loĝio“. Malsaĝaj elpensajoj.

16

KULTA MAGIO KAJ MITO

Enkondukaj rimarkoj. La verko de l' homo. Mito kaj realo. Mito kaj kulto. Kulto kiel magio. Magio kaj ekono. La interna lumo. La konkludo.

17

LA SENCO DE LA VIVO

Alvoko. La peko de la prapatroj. La plej alta posedo. La „malbona“ homo. Montriĝo de la mondo de lumo. Signifo de la silentado. Vero kaj veroj. Fina ĉapitro.

18

PLI DA LUMO!

(Nova, modifita eldono baldaŭ aperonta.)

Enkonduko. Al tiuj, kiuj laciĝis je dormado. La arkitektoj je la katedralo de la homaro. Teozofio kaj pseŭdo-teozofio. Pri la tri ŝtupoj, Kion oni penu ekkapti. La mistero de la arta esprimformo. Okcidenta-orienta magio. La lumo de la spirito en la kristanismo. La sekreto de la malnovaj konstruejoj de katedraloj. Pri la ĝusta diservo.

19

LA ALTA CELO

La voko de la spirito. La du vojoj. Pri serĉado kaj trovado. Pri la eterna lumo. Pri la koloroj de la lumo. Pri la alta celo. Pri la vojoj de la antikvuloj. Pri la beno de laboro. Pri la potenco de la amo. La majstro el Nazareto.

20

RELEVIĜO

Antaŭparolo. Releviĝo. La scio de la saĝuloj. Leĝo kaj hazardo. Vana penado. Okultisma karnavalo. Internaj voĉoj. La magio de timo. Limoj de la ĉiopoveco. La nova vivo. Festa ĝojo. Valoro de la rido. Venki sin mem. Perfektiĝo.

21

MONDOJ

Dudek koloraj reproduktaĵoj de miaj spiritalaj pentraĵoj. Antaŭparolo. La gvidado. La reveno. La vidaĵoj. Epilogo.

22

PSALMOJ

Infero. Savo. Ekkono. Promeso. Liberigo. Plenumiĝo.

23

LA EDZECO

(Nur la granda originala eldono)

Pri la alta sankteco de edzeco. Pri la amo. Pri la komuneco. Pri sufero kaj ĝojo. Pri tento kaj danĝero. Pri la deviga premo de la ĉiutaga vivo. Pri la volo al unueco. Pri la heredigo de feliĉo. Pri eterna ligiteco.

24

LA PREĜO

La mistero de preĝado. Serĉu, kaj vi trovos. Petu, kaj estos donite al vi. Frapu, kaj estos malfermite al vi. Spirita renoviĝo. Tiel vi preĝu. – Al tio ĉi apartenas ankaŭ la ekstra poŝformata eldonaĵo, kiu entenas nur la ekzemplojn de preĝoj de la lasta ĉapitro:

TIEL VI PREĜU

25

SPIRITO KAJ FORMO

La demando. Ekstero kaj interno. Loĝejo kaj verko. La formo de la ĝojo. La formo de la sufero. La arto de vivado.

26

FAJREROJ

(Germanaj mantroj)

Al tio ĉi apartenas la malgranda klariga traktajo:

PRAKTIKA UZADO DE MANTROJ

27

VORTOJ DE VIVO

Alvoko. Mi. Eniro en sin mem. Amo. Agado. Batalo. Paco. Forto. Vivo. Lumo. Iluminiĝo. Solena promeso.

28

SUPER LA ĈIUTAGA VIVO

Tridek kvar poemoj, sentencoj kaj instruaj poemoj. Unua parto.

29

ETERNA REALO

Dudek sep instruaj poemoj en ritma formo. Dua parto.

30

VIVO EN LA LUMO

Tridek du instruaj poemoj Tria parto.

31

LETEROJ AL UNU KAJ MULTAJ

Antaŭparolo. Tridek ĉapitroj en letera formo kun dek ok poemoj. Epilogo.

Tiu ĉi fina libro:

HORTUS CONCLUSUS

La dudek sep ĉapitroj nomitaj en ĝia tabelo de enhavo.

Massagno, en la somero de 1936

Bô Yin Râ

(Joseph Anton Schneiderfranken)

Ne apartenas al mia spirita instrua verkaro, kvankam estante plej intime ligita al ĝi, la rebata skribo:

KONCERNE MIN MEM;

krome la malgranda volumeto:

EL MIA PENTREJO,

en kiu estas samtempe menciata tio malmulta, kio en mia kvieta ekstera civitana vivo, apenaŭ tuŝita de eksteraj okazaĵoj ekde mia juneco, eble povas esti rigardata kiel iom rimarkinda,

kaj la kolekto, estiĝinta el praktika spertado, de dudek unu klarigantaj traktaĵoj pri aferoj de la *figura arto*, sub la titolo:

LA REGNO DE LA ARTO

(kiu ne estu konfuzata kun la unua libro kun pure spirita enhavo en mia instrua verkaro, t.e. “La Libro de la Reĝa Arto”) kaj fine la malgranda libro:

OKULTAJ ENIGMOJ,

kies temoj troviĝas *ekstere* de mia devo instrui.

Tradukoj de pliaj libroj
el la instrua verkaro de Bô Yin Râ
estas elŝuteblaj ĉe jena retejo:
boyin-ra.org/esperanto/